


julio-aŭgusto 1972
65-a jaro
n-ro 799-800 (7-8)

esperanto



**Njegoŝ
en la
Internacia Lingvo**

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando

Vi trovos

iom da orient-eŭropa tendenco en ĉi tiu nia jubilea (800-a!) numero de "Esperanto". Tio ja konvenas sur la sojlo de nova kongresa jaro, kiam Portland preskaŭ jam apartenas al la historio kaj la kongrespreparoj en Beograd vigle antaŭenmarŝas. En la momento, kiam la ŝtatprezidanto Tito transprenas la altan protekton de la Universala Kongreso (p. 122), ni memoras du aliajn eminentajn figurojn, kies apogo grave influis la pozicion de Esperanto ne nur en siaj landoj sed en gravaj internaciaj medioj: Dimitrov kaj Tolstoj (p. 127-128).

Ke la ceteraj artikoloj plejparte tuŝas la eŭropan unuiĝon, pri tio ni ne bezonas pardonpeti. Ĝi ja ne devenas el ia neglekto al la movado en aliaj kontinentoj sed el la aktualeco de la eŭropa problemaro, el kiu — kiel tamburas Grahame Smith (p. 124) — la lingva problemo elstaras kiel neniam antaŭe.

Enhavo

- 121 Internacia pedagogia eksperimento en 5 landoj (Prebil)
- 122 Itala virinaro sur la vojo al lingva solvo
- 122 Prezidanto Tito — Protektanto de 58a UK
- 122 Populariĝas la franca lingvo en Britujo (citaĵo)
- 123 Por pli efika informado (11): Ĝenerala kaj speciala informado (Lapenna)
- 123 Nia membraro en 1971 (Wensing)
- 124 Komuna Merkato diskrevigos la miton (Smith)
- 126 Kalendaro
- 127 Georgi Dimitrov kaj Esperanto (Aleksiev)
- 128 Vivinte kun Tolstoj (Lebrun)
- 130 Recenzoj
- 131 Laste aperis . . . (novaj eldonaĵoj)
- 133 Leteroj de legantoj
- 134 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 134 Nekrologo
- 136 TEJO-paĝo
- 137 Komenco bona — ĉio bona
- 138 Esperanto en Radio
- 139 Oficiala informilo: n-ro 458
- 140 Anoncetoj

La kovrilo

Kvazaŭ uverture al la 58-a Universala Kongreso de Esperanto, okazonta venontjare en la ĉefurbo de Jugoslavio, aperis unuafoje en la Internacia Lingvo la ĉefverko de la jugoslava literaturo "La montara krono", verko de la montenegra poeto Petar Petrović-Njegoš (1813-1851). (Vidu la recenzon sur la paĝo 132.) Lia monumento, kun simbola aglo, estas verko de la plej granda jugoslava skulptisto, Ivan Meštrović — tiu sama, kies statuo "Venkinto" fariĝis nun emblemo de la 58-a Universala Kongreso. La monumento de Njegoš, el nigra hercegovina granito, imponas sur la majesta monto Lovćen en Montenegro.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1882-1910). Ĉefredaktoro: V. Sadler. Redaktorino: A. Woessink-Nagata. Inkluzivas la organon de TEJO "La Juna Vivo" (TEJO-paĝo). Aperas monate (escepte de aŭgusto). Abonprezo por unu kalendaro jaro: 22,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 30,— gld.). Unuopa ekzemplero: 2,— gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 20,90; Suda Afriko, Azio, Sudameriko 14,30; Mezafriko, Norda kaj Meza Ameriko 11,—; Mezoriento, Nordafriko 7,70 gld. Anonc-tarifo: 1 p. 375 gld., 1/2 p. 200 gld., 1/4 p. 110 gld., 1/8 p. 65 gld., 1/16 p. 40 gld. Ripet-rabato 20%. Banko: Bank Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-3001. Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA). Telefono: (010) 36 15 39. Telegramadreso: ESPERANTO ROTTERDAM. Kompostita kaj fotografita en la Centra Oficejo de UEA. Presita ĉe Grafika Entrepreno Tuijtel en Hardinxveld, Nederlando. Legantoj en 88 landoj.

estraro de uea

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj: Prof. d-ro Ivo Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Mddx, HA9 8TF, Britujo. Vic-prezidanto kaj estrarano pri administrado kaj komercaj kaj industriaj rilatoj: E.L.M. Wensing, Postbus 72, Valkenswaard NB, Nederlando. Vic-prezidanto kaj estrarano pri turismo kaj aŭtomobilismo: E. Carlén, Yxhult, S-692 02 Kumla 2, Svedujo. Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado, delegita reto, junularo kaj diskonigo de la agado de UEA: G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 2, F.R.Germanujo. Estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj kaj pri organiza plifortigo: D-ro W. Bormann, D-205 Hamburg 80, Schärstr. 26, F.R.Germanujo. Estrarano pri kulturaj aferoj: J. Uśpieński, Warszawa-12, Poŝkesto 100, Pollando. Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-ro J.C. Wells, 17 Ashbourne Terrace, London SW19 1QX, Britujo. Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Onder de Beumkes 29, Velp (Gld.), Nederlando.

INTERNACIA PEDAGOGIA EKSPERIMENTO EN 5 LANDOJ

Dum unutaga restado en Maribor (Jugoslavio) en la jaro 1966 esprimis prof-o d-ro Mario Dazzini, ĝenerala sekretario de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), la ideon, ke la urbo Maribor estus taŭga centro por konferenco de esperantistaj organizaĵoj el Aŭstrujo, Italujo kaj Jugoslavio, kiuj ellaboru komunan interŝtatan konvencion pri samtempa oficiala enkonduko de Esperanto en la lernejojn de la menciitaj 3 landoj.

Surbaze de tiu ideo mi iniciatis en Maribor fondon de aparta komitato, kiu efektivigu la ideon. Mi ŝarĝis min per la funkcio de sekretario de Konstanta Organiza Komitato (KOK), kiu tuj decidis plilarĝigi la regionon de kunlaborantoj al 6 landoj: Aŭstrujo, Italujo, Greklando, Bulgarujo, Hungarujo kaj Jugoslavio. Ili ĉiuj akceptis la proponon, nur Greklando poste pro ŝanĝitaj politikaj cirkonstancoj retiriĝis.


Sekvis tre sukcesaj kunordigaj konferencoj: la 1a en 1967, 2a en 1968, 3a en 1970, 4a en 1971 kaj 5a de la 31a tago de marto ĝis la 2a de aprilo 1972, ĉiuj en Maribor. Sekvas la 6a en la 19a de julio 1972 en Budapeŝto en la kadro de la nunjara ILEI-konferenco.

Ĉiuj konferencoj okazis interkonsente kun kaj sub aŭspicioj de la respublika sekretario por kulturo kaj klerigo de S. R. Slovenio. Ĉe la 3a konferenco partoprenis jam la oficialaj reprezentantoj de superaj lernejoj instancoj de la landoj — kiel observantoj, tamen bonvoleme rigardantaj la problemojn de la plano.

La starpunktoj kaj la preparlaboroj maturiĝis ĝis la 4a konferenco jam tiom, ke oni decidis konkorde kun la kompetentaj lernejoj instancoj komenci la instruadon de Esperanto laŭ unuecaj bazaj didaktikaj dokumentoj kaj unueca lernolibro en formo de Pedagogia Didaktika Eksperimento (PDE) komence de la lerneja jaro 1971/1972. Ĉiujn dokumentojn kaj la lernolibron verkis d-ro István Szerdahelyi, profesoro kaj estro de la fakto "Esperanto — lingvo kaj literaturo" en la Scienca Universitato Eötvös Lóránd en Budapeŝto. Same li akceptis, kun oficiala aprobo de la hungara Ministerio por Popola Klerigo kaj de la Universitato, la plej gravan kaj respondecan taskon en la tuta nia plano — la centran gvidadon, la mezuradon kaj analizon de la eksperimento.

Partoprenas jam 800 gelernantoj

Laŭ ricevitaj informoj oni nun instruas Esperanton regule kaj oficiale en la kadro de PDE en: Aŭstrujo



(5 lernejoj), Bulgarujo (2 lernejoj), Hungarujo (9 lernejoj), Italujo (6 lernejoj) kaj en Jugoslavio (8 lernejoj), do entute en 30 lernejoj al proksimume 800 gelernantoj.

Venontjare certe kreskos la nombro de eksperimentaj klasoj. Ĉion supre menciitan ni faras en aktiva kunlaboro kun ILEI, precipe kun ĝia vicprezidanto s-ro Helmut Sonnabend (redaktoro de *Internacia pedagogia revuo*). Li preparis komunajn test-foliojn kaj nun verkas la skeman programon kaj apartan gvidlibron por praktika aplikado de Esperanto inter la gelernantoj, la eksperimentaj klasoj, instruistoj kaj la gepatroj de gelernantoj en PDE. Estas jam presata kaj en 1972 aperos en Budapeŝto tute esperantigita eldono de la lernolibro *Esperanto 1* de prof-o d-ro I. Szerdahelyi. Eldonkvanto 10 000 ekzempleroj, nur por uzo ekster Hungarujo.

Nia ekzemplo kaj sukceso instigis jam pasintjare la ILEI-organizaĵojn en nord-okcidentaj kaj skandinaviaj landoj de Eŭropo fondi similajn regionajn kunordigajn konferencojn. Certe kun la samaj celoj. Tial nun nia regiono fariĝis la 1a; en la 2a grupiĝis Belgio, Britujo, Francujo, F. R. Germanujo kaj Nederlando. Ili komencos la PDE-n en 1972/1973. La 3an regionon eniros la skandinaviaj landoj: Danlando, Finnlando, Norvegujo kaj Svedujo; en la 4a grupiĝos verŝajne la orient-eŭropaj landoj: Ĉeĥoslovakujo, Germana D. R., Pollando . . .

Jen ekzemplo, kiel kaj kiom oni povas atingi per bone organizita agado sur la kampo lerneja por kreado de amasa juna adeptaro de Esperanto kaj ĝia ideo. La aktivuloj de la kunordigaj konferencoj vidas en la sukcesa realigado de iliaj planoj la pruvon pri la ĝusteco de ilia vojo kaj belan rekompencan por ilia laboro.

Ludovik Prebil

ITALA VIRINARO SUR LA VOJO AL LINGVA SOLVO

La Nacia Konsilantaro de la Italaj Virinoj (NKIV; itale, C.N.D.I.) en sia 9a asembleo, okazinta en Milano en la 20a kaj 21a de majo 1972, aprobis rezolucion favoran al la lingva solvo i.a. per Esperanto.

NKIV estas unu el la 65 landaj filioj de Internacia Konsilantaro de Virinoj, kiu celas plibonigon de la sociaj vivoj de la individuo kaj la familio kaj kiu estas agnoskita de Unuiĝintaj Nacioj kiel neregistara organizaĵo en konsultaj rilatoj kun la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro de UN.

La itala filio NKIV enhavas 33 diversajn virinajn asociojn, kies reprezentantinoj unuanime aprobis la jenan rezolucion:

Rezolucio

La trijara Asembleo de Nacia Konsilantaro de Italaj Virinoj kunveninta en Milano la 20an kaj 21an de majo 1972,

konstatinte la unuarangan gravecon de la solvo de la lingva problemo por pli rapida evoluo al la formiĝo de reala eŭropa civitanismo;

akceptinte la indikon entenatan en la rezolucio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko (Montevideo, 1954) kiu celas agnoski la praktikan kaj kulturan valoron de la Internacia Lingvo Esperanto;

deziresprimas, ke la lingva problemo trovu solvon ekster ĉiu naciisma konsidero kaj kun respekto de la kultura integreco de ĉiu popolo;

rekomendas al la interesataj instancoj favori la studadon de la lingvoj vivaj, inkluzive de Esperanto, jam nun dum la devigaj lernojaroj, en la atendo de fina decido alprenota tuj kiam la kondiĉoj historiaj, politikaj, ekonomiaj kaj sociaj tion permesos.

Subskribis: Maria Pia Roggero (Mazzini-a Itala Asocio), Anna Volli (Itala Virina Alianco), Liliana Rivabella (Internacia Virina Rondo), Giulia Gentili Filippetti (Itala Centro por Geedza kaj Antaŭgeedza Edukado), Elvira Zanon (Nacia Ligo de Italaj Virinoj), Elda Scarzella Mazzocchi (Asocio de Hebrea Virino en Italujo).

Prezidanto Tito — Protektanto de 58a UK



Josip Broz Tito

La prezidanto de Jugoslavio Josip Broz Tito, kiu ĉi-jare festis 80-jaran jubileon, akceptis fariĝi Alta Protektanto de la 58a Universala Kongreso de Esperanto, okazonta en la ĉefurbo de Jugoslavio (Beogrado) en 1973.

Estas duafoje en la historio de Esperanto, ke ŝtatestro, kiu lernis Esperanton, alte protektas Universalan Kongreson. (Unuafoje tio okazis en la 55a UK en Vieno.)

La informon pri la Alta Protektanteco jam disaŭdigis la tutjugoslavia televida reto.

Populariĝas la franca lingvo en Britujo

“La intenco de la brita registaro aliĝi al E.E.K. forte stimulis la interesiĝon pri la franca lingvo. La lingvaj institucioj komunikas, ke subite multe pli da gelernantoj enskribigis sin por tiu lingvo kaj ke precipe komercistoj interesiĝas. La registaro — laŭ la komunikado — konsideras, ĉu plivastigi la lingvo-lecionojn en la lernejoj. Oni ekinstruos la francan en la bazaj lernejoj kaj oni atendas, ke post kelke da jaroj 70% el la gelernantoj pli malpli regos la lingvon. Inter la geinstruistoj aŭdiĝas voĉoj, enkonduki en ĉiujn lernejojn ankoraŭ trian lingvon, la germanan.”

— *De Nieuwe Krant* (Nederlando), 1972-05-09

Ĝenerala kaj speciala informado

IVO LAPENNA


La ĝenerala informado estas direktita al la larĝa publiko kaj havas la celon krei favoran sintenon de la vastaj popoltavoloj por la solvo de la lingva problemo per la Internacia Lingvo. La enhavo de tiu ĉi speco de informado povas esti plej koncize formulita jene: prezenti la nuntempan lingvan problemon en mondaj kadroj, en diversaj regionoj, eĉ interne de unuopaj ŝtatoj; demonstri per faktoj kaj argumentoj, ke neniua nacia lingvo, aŭ pluraj tiaj lingvoj kune, solvas la problemon de lingva komunikado; prezenti la bazajn kaŭzojn, pro kiuj Esperanto respondas al la bezonoj de komunikado en ĉiuj sferoj de la moderna internacia vivo; prezenti la ĝisnunajn atingojn de Esperanto, kaj samtempe klarigi almenaŭ la ĉefajn obstaklojn al ĝia pli rapida disvastiĝado (antaŭjuĝoj, persekutoj, militoj, kontraŭstaro de lingvaj kaj kulturaj imperiismoj k.a.); ĝenerale pledi por lernado de la Internacia Lingvo, emfazante, interalie, la fakton, ke, ju pli da personoj scias ĝin, des pli granda estas ĝia socia signifo kaj des pli da utilo ĝi donas al ĉiu lerninto. La ĉefa ideo de ĝenerala informado devus esti, ke jam nun la scio de Esperanto donas rimarkindajn avantaĝojn, kaj ke la estontecon de la Internacia Lingvo garantias la senduba plia intensiĝo de interhomaj rilatoj en la mondo.

Adapti al sia fako

La speciala informado estas direktita al apartaj medioj, kies interesoj transiras la limojn de iliaj naciaj lingvoj, ekzemple sciencistoj, diversaj fakuloj, komercistoj, membroj de internaciaj organizaĵoj kaj movadoj. Grandan atenton necesas dediĉi al junularo ĝenerale kaj, speciale, al gelernantoj en mezgradaj lernejoj kaj al gestudentoj en la universitatoj. La taskoj en tiu ĉi agadsfero estas pli facile plenumeblaj, se la ĝenerala informado jam kreis favoran sintenon de la publika opinio. Superflue diri, ke por speciala informado oni aplikas la samajn rimedojn, sed la enhavo estas adaptita al la konkretaj medioj. Apenaŭ necesas diri, ke efikan specialan informadon povas fari nur bonaj konantoj de la koncernaj medioj: al gelernantoj kaj gestudentoj plej bone povas paroli iliaj gekolegoj aŭ geinstruistoj; nur industriistoj kaj komercistoj povas sukcesplene agadi en la medioj de industrio kaj komerco; kaj idente por kiu ajn alia branĉo aŭ fako. Ne atenti al tio signifas anticipi ruinigi ĉion.

Ambaŭ formoj estas same gravaj kaj kompletigas unu la alian.

NIA MEMBRARO en 1971



E. L. M. WENSING

Espereble multaj el niaj membroj ne pretervide turnis la paĝon 78 de la aprila numero de nia revuo, ĉar ĝi havigas al ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la stato de nia Asocio, gravegajn informojn, ne nur pri la disvasteco de nia legantaro el geografia vidpunkto, sed ĉefe koncerne la laŭlandan disdividon inter Individuaj Membroj kaj Asociaj Membroj.

Nia revuo estas regule legata en ne malpli ol 88 landoj, kio, pli elokvente ol kio ajn, demonstros la veran internaciecon ne nur de la Internacia Lingvo, sed precipe ankaŭ de nia Asocio. Tamen restas la bedaŭrindega fakto, ke el entute pli ol 32 000 membroj (individuaj kaj asociaj), nur iomete pli ol 7 000 apartenas al la kategorio de Individuaj Membroj (apenaŭ 22%!).

Kompreneble ni scias, ke en pluraj landoj, kies deviza sistemo ne permesas libere transpagi fremdajn valutojn al alia lando, ekzistas gravaj malhelpoj, kiuj bremsas aliĝon kiel I.M., sed, rapide kalkulante, oni facile ektrovas, ke en tiuj landoj, kie tiaj malfacilaĵoj ne ekzistas, troviĝas minimume 10 000 asociaj membroj, kiuj povus tuj fariĝi I. M. de UEA.

Imagu, kion UEA povus entrepreni, kiamaniere UEA povus pliampleksigi kaj pliriĉigi nian revuon, kiel ĝi povus intensigi sian informadon kaj ĝeneralan agadon en ĉiuj medioj, se 10 000 Asociaj Membroj decidus flankenmeti ĉiusemajne egalvaloron de nur 60 nederlandaj cendoj — kio sumiĝas al 30 guldenoj jare — fariĝante tiel I.M. de nia Universala Asocio.


UEA bezonas subtenon de ĉiuj

Jen kuŝas unu el la plej gravaj fekundaj taskoj por niaj Landaj Asocioj, por niaj lokaj grupoj, por niaj agopretaj diligentuloj.

Ni ĉiuj ekkonsciu pri la nepreco de laŭeble fortika centra organizaĵo, pri la valoro de prestiĝa organo, pri la neceso de kvalifikitaj kaj fakspertaj specialistoj en la Centra Oficejo por nia tutmonda informado, por sperta redaktado de niaj periodaĵoj, por la organizado de ĉiaj kampanjoj, ekspozicioj, vojaĝ-aranĝoj, kongresoj, seminarioj kaj tiel plu.

Ĉion tion via UEA volas kaj povas fari, sed por tion efektivigi ĝi bezonas la subtenon de ĉiuj. Sekve mi alvokas ĉiun lokan grupon, ĉiun Landan Asocion, ĉiun aktivulon en niaj vicoj, ĉiun celkonscian esperantiston, ĉiun delegiton kaj ĉiun ĉefdelegiton, por ke ili nelaciĝe eklaboru por transformi niajn multajn Asociajn Membrojn en aktivajn Individuajn Membrojn.

KOMUNA MERKATO DISKREVIGOS LA MITON



Heath: provis la francan.

Pompidou: rifuzas la anglan.

La parolado de la nova prezidanto de Brita Esperantista Asocio, farita en ĝia ĉi-jara kongreso en Brighton, tiklas leĝere kelkajn aspektojn de la angla lingvo en kaj ekster Britujo lige kun ĝia aliĝo al Eŭropa Ekonomia Komunumo (alinome, Komuna Merkato). Tiu aliĝo diskrevigos — li profetas — la britan miton, ke ĉiuj komprenas la anglan, se oni nur krias ĝin sufiĉe laŭte.

Geamikoj! Mi sentas min kiel la lasta kuranto en stafetkurado. Mia antaŭulo postlasis al mi bonan avantaĝon, kaj mi rigardas la aliajn konkursantojn, sciante, ke ili certe eĉ ne povos fini la konkurson kaj des malpli povas esperi venki. Al iliaj kruroj obstakloj estas ligitaj — nacia orgojlo, la rajtoj de la malpli grandaj nacioj, la malfacileco lerni fremdajn lingvojn — ĉiuj peze katenas kaj stumbligas tiujn aliajn kurantojn.

Antaŭ ni etendiĝas longa, malfacila kaj laciga kurado. Venis la momento por nia plej granda fortoŝtreĉo, lasta streĉo de la forto kaj de la volo, sufiĉe granda por pravigi tiujn jardekojn da laboro farita de la esperantistoj, kiuj preparis por ni la vojon. Al ĉiu el ni unuope nun venas la devo, fari ĉion, kion

ni ĝis nun faradis, sed duoble pli forte. Ni jam venis sufiĉe proksimen por vidi la premion sed devos ŝviti por ĝin atingi.

Ĉar venis nun nia jaro. Nia provotempo estas nun ĉi tie. Ne plu ni batalas por esperaĵo aŭ por idealaĵo: ni troviĝas nun meze en la praktika realaĵo de kreskanta kaj ĉiam pli grava lingva problemo, kies ŝlosilon tenas nur ni. La malklaraj akvoj de la malnova luktado fariĝis klaraj, kristaligante unu unuopan malamikon, la anglan lingvon. La aliaj malaperis, forvaporigis. Revenante al mia alegorio, la stafeto por la angla en la konkurso por solvi la lingvan problemon estas *British Council*¹. Kaj *British Council* estas grasa kaj malvigla post longa kaj trosatiga dieto de mono kaj memkontenteco.

Niaj antaŭuloj alfrontis pli da malamikoj. Ĝis antaŭ ne tre longe, la rolon de internacia lingvo ambiciis ne nur la angla lingvo. La francoj insistas ankoraŭ pri la uzo de la franca lingvo, kaj longe ili daŭre insistu, en internaciaj renkontiĝoj, kaj aparte en la Komuna Merkato; sed la francoj nun kredeble akceptis, ke la mondo ne lernos la francan. Povas esti, ke al tiu fakto ŝuldiĝas la grandaj sukcesoj atingitaj de Unuiĝo Franca por Esperanto, ĉar en Francujo estas pli da delegitoj de Universala Esperanto-Asocio ol ie ajn alie en la okcidenta mondo. Samtempe, la germana lingvo ne plu estas altrudata kiel ebla internacia idiomo. *Goethe-Instituto*, instanco simila al nia *British Council*, daŭre reduktas sian agadon en rilato al la disvastigo de la germanaj lingvo kaj kulturo. La klopodoj propagandi ian Bazan Francan kaj Bazan Germanan lingvojn, kun simila Baza Hispana kaj ĉiuj aliaj — ĉiuj disfalis.

Superflua okullavaĵo kaj korpa akvo

Tio ne signifas, ke la milito estas gajnita: gajnitaj estas nur la pli multaj bataloj. Permesu al mi citi la faman tradukon de *Basic English*² de granda parolado farita de Churchill al la brita parlamento en la jaro 1940: "*I promise you nothing but blood, work, excess eyewash and body water*" ("Mi promesas al vi nur sangan, laboron, superfluan okullavaĵon kaj korpan akvon"). Pli bone mi traduku el la patosa kaj efika angla originalo rekte en Esperanton, en kiu ĝi estas egale patosa kaj efika: "*I promise you nothing but blood, toil, tears and sweat*", do: "mi promesas al vi nenion, krom sango, penado, larmoj kaj ŝvitado". Ne mirige, ke *Basic English*, tiu idiota ludilo de tiu idiotinfano, de Kolonelo Blimp, *British Council* estis forŝlosita, forkaŝita en iu polva tirkesto de Whitehall³, kun la espero, ke ĝi estos forgesita kune kun la vastaj monsumoj elspezitaj en la provo ĝin vivigi.

La fakto, ke la angla lingvo nun estas la sola alia kuranto krom Esperanto en la konkurso al internacia kompreniĝo, donas al ni apartan respondecon.

British Council elspezas ĉiujare 23 000 000 da pundoj kaj pli, plejparte el la impostoj, kiujn ni pagas, kun la celo vastigi la uzon de la angla lingvo en eksterlando kaj diskonatigi la kulturon, kiu fontas el la angla lingvo.

Kiel povas esti, ke la skotoj, la kimroj kaj la irlandanoj toleras esti impostataj por subteni la klopodojn

GRAHAME
L. SMITH

dronigi iliajn lingvojn kaj ilian kulturon, tion mi ne scias. Se ili scius, verŝajne ili ne tolerus.

La malnovaj membroj certe rememoras tiujn tagojn post la milito, kiam la brita registaro aĉetis *Basic English* je kostoj de ĉirkaŭ 23 000 pundoj, kaj nia pledo por natura saĝeco en la kampo de lingvo trovis respondon papagoblekan: "*Basic English* estas la solvo". Kiel ĝisfunde kaj komplete tiu argumento estas nun senkreditigita! Tiuj, kiuj tiam ĝin skandadis, kaj aparte tiuj, kiuj estis en oficialaj postenoj, volonte konfesis, ke la plena angla lingvo estas tro malfacila, ol ke alilingvanoj povus lerni ĝin tiel bone, ke la angla estu la komuna internacia lingvo.

Tiu estis la premiso, sub kiu ili elspezis amason da mono por *Basic English*, por ĝin transdoni al *British Council*, por ke tiu disvastigu ĝin kiel la internacian lingvon. Sed nun, kiam jam malaperis *Basic English* — kaj neniam eĉ unu lernanto povis paroli ĝin — nun kviete malaperis ankaŭ la konsento, ke la plena angla lingvo estas tro malfacila.

15 milionoj da pundoj por la angla

Sed daŭras la multekostaj arlekenaĵoj de *British Council*. Ĝi forĵetas la monon de la impostpagantoj je senespera kaj absurda tasko. Parlamentaj subvencioj al *British Council* estis senbrue pliigitaj en la prepara periodo por nia aliĝo al la Komuna Merkato. Per rektaj parlamentaj subvencioj ĝi ricevis 12 647 000 pundojn en la fiska jaro 1969/70, kaj 14 725 000 pundojn en 1971/72; do plialtigo de proksimume 16%.

Kia katalogo da malsukcesoj, se ni rigardas, kion ĝi faras per tiu mono kaj per la cetera mono, kiun ĝi disponas. En la jaro 1970/71 ĝi elspezis 426 739 pundojn por oficejo en Pakistano, senkonsidere pri la elspezado por libroj, sonbendoj, filmoj, studentaj interŝanĝoj kaj tiel plu. Ĉi-jare la angla ĉesas esti la dua oficiala lingvo de Pakistano, kiel ankaŭ de Bangladeŝo.

Kiom da impostpagantoj scias, ke ili elspezas ĉiujare proksimume unu novan pencon kaj kvaronon (proksimume 0,10 gld.) por ĉiu viro, virino kaj infano de Grekujo por persvadi ilin al lernado de la angla, dum la kimroj riskas karceron por protesti kontraŭ la angla.

Oni elspezas ĉiujare 175 000 pundojn, nian monon, por persvadi la popolon de Irano uzi la anglan kaj aprezi la anglan kulturon, dum la sudirlandanoj faras rubfajron el registaraj eldonaĵoj, ĉar ili estas angla-lingvaj kaj ne gaelaj⁴.

Oni eĉ elspezas 28 000 pundojn jare por oficejo en Belgujo, dum la belgoj bataladas sur la stratoj pro la trudado de la franca lingvo al nederlandlingvaj regionoj.

Jam delonge en nia lando troviĝas la kredo, ke eksterlandanoj komprenas la anglan, kondiĉe nur, ke oni kriu ĝin sufiĉe laŭte. Ni vidas nun registarojn, unu post alia, dungi tiujn profesiulojn por fari tiun kriadon por ni, kaj provizi al ili multekostajn amplifilojn, ĉar la eksterlandanoj ne volas aŭskulti. Kaj tamen la instruado de la angla, en mondaj kadroj, malkreskas.



G. L. Smith

Tiu ĉi jaro estas nia jaro, ĉar la Komuna Merkato baldaŭ diskrevigos la miton. Jam en Bruselo la traduklaboroj por la Seso postlamas je du jaroj. Kiel estos, kiam oni devos lukti kun ok aŭ naŭ lingvoj? La unuan pafon ĵetis s-ro Jack Lynch, la irlanda ĉefministro, kiam li insiste parolis la gaelan en la aliĝa ceremonio de la Komuna Merkato, anstataŭ paroli en la angla. Eĉ se li estis preta fordoni la suverenecon en tiu grado, kiun la Traktato de Romo postulas, li tamen volis klare montri, ke iujn aferojn nacio ne volas fordoni, inter kiuj sian lingvon; ĉar, kiel laŭ Boswell diris d-ro Johnson, "la lingvoj estas la genealogioj de nacioj".

Se Heath ne lernas la francan en 4 jaroj ...

Eble la Esperanto-movado devus konsideri la eblecon, doni premion ĉiujare al tiuj, kiuj plej multe helpis la aferon. S-ro Lynch certe kvalifikiĝis por tia premio. Alian premion mi rekomendus por s-ro Pompidou, pro lia publika rezoluteco⁵, neniam paroli la anglan. Trian mi proponus al s-ro Heath, pro lia provo paroli la francan. Lia televidita klopodo, paroli la francan, elvokis elkoran ridegon same en Francujo kiel en Britujo.

Sed ni memoru la signifon de tiu incidento. S-ro Heath estis kapabla lernanto en la gimnazio, kaj tie li studis la francan dum kvar jaroj. Li konfesas, ke li ne povas konversacii en la franca; kaj kiam li alparolas la francan popolon en tio, kion li supozas ilia lingvo, ili ne povas ne ridi.

Ĉu do ni eĉ prenu en konsideron la eblecon, ke ekzemple dujaraj kursoj de la angla lingvo en eksterlando iam povos prezenti praktikan solvon de la lingva problemo? Se s-ro Heath ne povas lerni la francan en kvar jaroj, kiel la ordinara homo povus sukcesi en la duono de tiu tempo? Li neniam, eĉ per dudek jaroj da studado, lernos la anglan ĝis tiu punkto, kie nacio povas paroli al nacio, laŭ la hipokrita devizo de BBC⁶.

Nacio estas popolo, ordinara popolo. Ĉiam estis evidente, ke la instruado de la angla aŭ de la franca en la lernejoj ne povas solvi la lingvan problemon. Tio, kio igas la venontan jaron tiel grava, estas, ke tiu fakto estos demonstrita. Samtempe, la granda disvastiĝo de la ideo instrui Esperanton en la lernejoj dum unu jaro demonstros praktike, ke ordinara homoj povas paroli unu al alia sen forcedo de la propra nacia identeco aŭ kulturo, sen avantaĝigo de unu grupo uzanta sian gepatran lingvon.

Se per internacia kompreniĝo ni celas, ke hispana aŭ itala kelnero lernu dudek frazojn, tiukaze sufiĉas la

Notoj de la redakcio

- 1 "British Council": la brita instanco por disvastigo de la angla lingvo kaj brita kulturo.
- 2 "Basic English": "Baza Angla" lingvo vortare limigita al 850 vortoj, — sistemo inventita de C.K.Ogden.
- 3 "Whitehall": sidejo de la brita registaro.
- 4 gaela lingvo: la oficiala lingvo de la Irlanda Respubliko.
- 5 rezoluteco: firmeco en la plenumado de siaj decidoj aŭ projektoj.
- 6 "BBC" = "British Broadcasting Corporation" = Brita Elsenda Korporacio.

Komuna Merkato diskrevigos la miton

(daŭrigo de p. 125)

angla. Sed ne tion oni bezonas. La sola vera havebla rimedo de interkomunikado estas Esperanto, kaj ni devos certigi, ke tiu mesaĝo estos aŭdata en la venonta jaro.

Trejni siajn komizojn por Esperanto

La sindikatoj devus nun konstati la danĝeron, kiu minacas ilin, kaj mi forte rekomendas al tiuj el vi, kiuj estas anoj de sindikatoj, levi tiun demandon en sindikataj kunvenoj. Multnaciaj kompanioj povas komunikiĝi kaj propracele kunlabori, sendante siajn administrantojn al multekostaj kursoj de la franca aŭ la germana, po 500 pundoj por ĉiu. Sed kio pri la laboristoj? Ĉu la sindikatoj konsentos esti fragmentigitaj, splititaj en lingvajn grupojn? Ĉu neniam estos eŭropa konsilantaro de Sindikatoj, se jam ekzistas organizaĵoj de labordonantoj en internacia skalo? Ĉu la dungitoj ne povos renkontiĝi kaj paroli unu al aliaj kun kompreno?

Ĉu en estonteco la sindikatestroj devos esti elektitaj

surbaze de lingva kapablo? Kaj same la politikistoj? Kaj diplomatoj? Kaj intertraktantoj?

La brita komercisto baldaŭ ricevos teruran ŝokon. La eniro de Britujo en la Komunan Merkaton estos ruinige multekosta por la meza komercisto, se la lingva problemo ne estos solvita. Li sidas ĉe sia labortablo kun sia anglalingva prospektaro, atendante, ke la aĉetistoj el la tuta mondo komprenos. Ili ne komprenos.


Li kuros al la tradukagentejoj, kaj tie trovos la problemojn de altaj kostoj kaj prokrastoj. Li trejnos siajn komizojn, denove je altaj kostoj, por la franca kaj por la germana; kaj trovos sin venkita en komerco kun Grekujo aŭ Turkujo, Afriko aŭ Azio, Suda Ameriko aŭ Japanujo.

Fine, li venos al kompreno pri tio, kion la Esperantomovado diras jam dum jardekoj. Li povus trejni siajn komizojn por Esperanto kun malgrandaj aŭ neniam kostoj, kaj liaj paraleluloj eksterlandaj faros same, kiel ni scias, ke ili nun faras en konsiderindaj nombroj. Post unu semajno, lia sekretariino atingos pli altan gradon de kompreno en Esperanto, ol ŝi atingus en la franca lingvo post unu monato.

Ankaŭ tiu mesaĝo devas esti komprenigita al la komercistoj, kaj estas nia devo, kolektive kaj indvidue, nun liveri ĝin.

Tiel venas granda jaro por Esperanto. Estu pretaj! Estu viglaj! Kaj, antaŭ ĉio, esperu!

KALENDARO



Julio

- 2-8 Somera Universitato, Jyväskylä, Finnlando
- 2-23 Int. Kulturaj Semajnoj, Grésillon, Francujo
- 5-22 Seminario por pedagogoj, Primošten, Jugos.
- 9-15 X-a Jubilea Somera E-Univ., Gyula, Hung.
- 9-16 Inter. tendaro, Päijänne, Finnlando
- 9-12/8 20a Somera E-Tendaro, Třebíč, Ĉeĥosl.
- 14-16 Antaŭkongreso de TEJO, Varsovio, Pol.
- 15-16 59a Japana Kongreso, Takamatu, Jap.
- 15-21 34a Int. Kongreso de IKUE, Como, Italujo
- 15-31 2a Inter. Laborkampo, Roccasecca, Italujo
- 16-22 28a Kongreso de TEJO, Toruń, Pollando
- 17-23 Kultura Festivalo, Budapest, Hungarujo
- 16-13/8 20a Somera E-Tendaro, Lančov, Ĉeĥosl.
- 18-24 Int. Konferenco de ILEI, Budapest, Hung.
- 20-23 7a Kultura Seminario, Curitiba, Brazilo
- 20-25 32a Kongreso de HEF, Vigo, Hispanujo
- 22-25 Postkongreso de TEJO, Gdańsk, Pollando
- 22-28 45a Kongreso de SAT, Kuopio, Finnlando
- 23-30 Int. Feriaj Kursoj, Aabyhøj, Danlando
- 23-30 Eŭropa E-Konferenco, Vieno, Aŭstrujo
- 23-6/8 Int. dusemajna periodo, Grésillon, Franc.
- 24-26 14a Kanada E-Kongreso, Victoria, B.C., Kan.
- 24-1/8 Int. tendaro, Toruń, Pollando
- 24-2/8 Int. Renk. de naturamikoj, Abaliget, Hung.
- 24-3/8 10a Int. Turista renkontiĝo, Szeged, Hung.
- 26-2/8 25a Kongreso de KELI, La Rochette, Fran.
- 26 Publikigo de la Unua Libro de Esperanto (1887)

- 26-2/8 25a Kongreso de KELI, La Rochette, Fran.
- 29-5/8 57a Universala Kongreso, Portland, Usono
- 29-5/8 14a Baltlanda E-Tendaro, Häädemeeste, Sov.
- 30-5/8 SEMED'72, Rethimnon-Kriti, Grekujo
- 30-6/8 Sveda somera semajno, Frostavallen, Sved.
- 30-27/8 Someraj Univ. Kursoj, Liège, Belgujo

Aŭgusto

- 6-13 Ofic. Postkongreso 57a U.K., San Francisco, Usono
- 6-27 Studsemajnoj, Grésillon, Francujo
- 12-19 Eŭropa E-Konferenco, Zagreb, Jugoslavio
- 19-31 40a Int. Kongr. de LIBE, Rimini, Italujo
- 27-10 Kulturo kaj ripozo, Grésillon, Francujo

Septembro

- 1-8 Tutmonda veg.kongr., Bad Sachsa, F.R.G.
- 2-9 Intern. turista renkon., Maria Alm, Aŭst.
- 9-10 Amika renkontiĝo, Dudince, Ĉeĥoslovakio
- 16-23 43a Itala kongreso, Pisa, Italujo
- 18-1/10 8a Inter. E-Feriado, Miedzygórze, Pollando
- 22-24 Trilanda (aŭstra-jugosl.-itala) E-renk., Klagenfurt, Aŭstrujo
- 22-24 Aŭstria E-Kongreso, Klagenfurt
- 29-1/10 Vinrikolta semajnfino, Szentendre, Hung.
- 30-7/10 5a Pupteatra Int.Festivalo, Zagreb, Jug.

Oktobro

- 24 Tago de Unuiĝintaj Nacioj

Decembro

- 10 Tago de Homaj Rajtoj
- 15 Zamenhof-Tago (LLZ naskiĝis en 1859)
- 15 Tago de la Esperanto-Libro
- 28-2/1 2a Vintra E-Ferio, Budapest, Hungarujo
- 31 Kotizoj Universala Kongreso altiĝas

GEORGI DIMITROV KAJ ESPERANTO

“Ne ekzistas plenvaloraj kaj malmultvaloraj popoloj”

NIKOLA ALEKSIEV

La internacia Esperanto-movado ĝuas la subtenon de famaj ŝtatestoj, sociaj kaj kulturaj agantoj, politikistoj kaj filozofoj kun diferencaj, eĉ tute kontraŭaj ideologiaj kaj religiaj konceptoj. En nia nefacila esperantista agado ni povas kaj devas profiti tiujn al ni favorajn deklarojn subtene al la ideo pri internacia lingvo aŭ rekte al Esperanto. Kiel diras la bulgara proverbo “Ĉiu ŝtono pezas sur sia loko”, tiel ankaŭ la opinio de tiu aŭ alia estas plej aŭtoritata en la medioj, kie la koncerna famulo “pezas kiel ŝtono”.

Unu el la plej elstaraj personoj de nia epoko, kiu havis kaj esprimis favoran rilaton al la laboro de la esperantistaro, estas la fondinto de la nuntempa bulgara ŝtato Georgi Dimitrov. Mag. Isaj Dratwer jam citis lian opinion sur la paĝo 112 de sia konata verko *Pri internacia lingvo – dum jarcentoj*, eldono de CED.

Li alte taksis la agadon de la esperantistaro por reciproka interkonatiĝo de la popoloj, por la eduko en la esperantista medio de sinceraj internaciismaj sentoj kaj konceptoj intime interplektitaj kun popola patriotismo. Kiel konate, mem d-ro Zamenhof en 1907 deklaris en publika parolado, ke la laboro por disvastigo de Esperanto unuflanke, kaj la sincera patriotismo de la esperantistoj aliflanke, ne povas esti malamikaj inter si.

Dimitrov subtenis la esperantistan movadon ankaŭ pro tio, ke ĝi aktive strebas al kultura kaj ekonomia kunlaborado inter popoloj kaj ŝtatoj sendistinge de iliaj internaj sociaj kaj politikaj sistemoj. Laŭ lia opinio tiu estas la plej certa vojo al stabiligo de pacaj rilatoj inter ŝtatoj en la tuta mondo.


Dimitrov diris ne nur unu fojon, ke en la sfero de la kulturo ne ekzistas grandaj kaj malgrandaj popoloj: “Ne ekzistas plenvaloraj kaj malmultvaloraj popoloj. Ĉiu popolo, kiom ajn malgranda ĝi estas, povas esti kapabla enporti en la komunan trezorejon de la kulturo sian propran kontribuon de valorajoj”.

Li ŝatis la atingiĝojn de la aliaj landoj kaj instruis la bulgaran popolon labori tiamaniere, ke en la daŭro de 15-20 jaroj ĝi atingu tion, kion aliaj popoloj kaj landoj atingis en cent jaroj.

Subteno al Esperanto per prespapero

Tiuj konvinkoj de Georgi Dimitrov estis la premo, por ke li havu pozitivan rilaton al la Esperanto-movado ne nur vorte, sed ankaŭ reale. Tiel ekzemple, en la ekskluzive malfacila periodo tuj post la fino de la Dua Mondmilito, kiam la ruinigita Bulgarujo ne posedis la necesajn importatajn stokojn de prespapero, Georgi Dimitrov insistis antaŭ la koncerna ministro certigi la bezonatan prespaperon por la monata revuo *Internacia kulturo*, komence

organo de BEA, poste komuna revuo de balkanlandaj esperantistaj movadoj. Estas konata la bonegaj roloj, kiun ludis *Internacia kulturo* en tiu periodo por la plifortigo kaj stabiligo de la esperantista movado en Bulgarujo, Jugoslavio kaj Rumanujo. La nuna prezidanto de UEA, prof. Ivo Lapenna, loĝanta tiam en Zagrebo, ankaŭ eniris la trilandan redakcian komitaton de *Internacia kulturo*.



Georgi Dimitrov

Persona sekretario de Georgi Dimitrov estis veterano de bulgara esperantista movado, originala poeto kaj tradukisto, redaktoro de la revuo *Nuntempa Bulgario*, Asen Grigorov.

Nun estas festata en multaj landoj la 90-a naskiĝtago de Georgi Dimitrov. Ni estas forte konvinkitaj, ke la esperantistoj en multaj landoj povus praktike profiti en sia por-Esperanta agado la pozitivan rilaton de Dimitrov al la esperantista movado por kontraŭbatali sukcese la senmotivan opoziciemon al Esperanto en iuj medioj.

Nikola Aleksiev, komitatano de UEA kaj prezidanto de Bulgara Esperantista Asocio, Sofio

VIVINTE KUN TOLSTOJ

— Rememoroj de lia sekretario Lebrun

Vojaĝante ĉi-somere tra suda Francujo, mi tute hazarde — en la hejmo de ges-roj Nourmont kaj poste dank' al helpo de s-ro Jullien el Aix-en-Provence — povis renkonti s-ron Victor Lebrun, la lastan sekretario de la granda verkisto Leo Tolstoj.

Nun jam naŭdekjara, sed impone verva, Lebrun estas ja konata esperantisto kaj homo de ravloga spirito. Ni ĉiuj scias, ke li estas ankaŭ aŭtoro de rememoroj pri Leo Tolstoj, skribitaj en la lingvoj Esperanta, franca kaj rusa. Neniu el la versioj aperis ĝis nun libroforme, krom la itala elfrancigo ("Devoto a Tolstoj", Milano 1963, Lerici Editori).

S-ro Lebrun estis bonvola disponigi al mi la Esperantan tajpaĵon, el kiu mi nun preparas polan tradukon por la Eldonejo "Ossolineum" kaj kies fragmenton presis pola literatura revuo "Współczesność" ("Nuntempo") kune kun mia raporto pri la aŭtoro.

La intima akompanulo de la rusa geniulo vivas kiel la sola atestanto de lia lasta jardeko. Liaj rememoroj ne estas ĝis nun publikigitaj, kvankam la aŭtoro verkis la libron originale en Esperanto. Mi konsideras tion unika ŝanco prezenti al la monda literaturo la raran kontribuaĵon de Lebrun en la Internacia Lingvo. Ĝi ja devigas ĉiun postan eldonon dependi de la originalo kaj ĉie menciigi ĝin kiel la fonton. Ĝi ankaŭ povos iĝi la sola fonto de la naciaj tradukoj, kiuj devus sekvi.

Kunestante nun kun la manuskripto de Lebrun mi travivas nekompareblan ĝuon kunesti kun la epoko malaperinta, pri kiu la unikan ateston donas esperantisto.

Tyburcjusz Tyblewski



V. Lebrun festis ĉi-jare 90an naskiĝtagon en sia hejmo en franca vilaĝo. La apuda artikolo estas fragmento el la parto "Majstro kaj disĉiplo" en lia verko kun rememoroj pri Leo Tolstoj.

====

VICTOR LEBRUN

Dum duono de jarcento, meze de neelteneblaj kondiĉoj, spite al ĉiuj cenzuroj kaj al ĉiuj doganbaroj, verkadis mi ĉi tiun libron. Tri gravegaj kaŭzoj instigadis min al tiu laborego kaj donis al mi fortojn finkonduki ĝin.

Unue — dum mia vivo, kiu komencas esti jam sufiĉe longa, mi trovis feliĉon tute ne ordinaran, sed la feliĉo plejparte estas atingebla por ĉiu. Sekve oni ne devis ŝpari fortojn por elmontri ĝin.

Due — ekkonigis al mi tiun feliĉon la verkoj de Leo Tolstoj. Nepris do el la skribheredaĵo de la majstro elekti la bazajn verkojn por uzo de la estontaj generacioj kaj precizigi la vidlokon, de kiu ili estas studentaj, por ke la tuta ilia graveco povu esti evidentiĝata. Necesis ankaŭ montri kiel, paŝon post paŝo, la majstro kondukadis sian plej junan lernanton.

Trie — fine, la granda verkisto persone, dum la dek lastaj jaroj de sia vivo, donadis al mi tiom da amatenito, estis por mi tiel gravega spiritapogo, ke — ĉe la fino de mia vivo — mi ege volus redoni al lia memoro almenaŭ parton de tiuj netakseblaj servoj, kiujn li donacis al mi dumvive.



Kun la fervojista patro, Lebrun kelkfoje transloĝiĝis de stacio al stacio kaj, estante 5-jara, rapide eklernis fari longajn rajdadojn.

Mi ne bezonas malkonfesi tion. Mi volus fari al la memoro de Leo Tolstoj, kion sukcesis fari Ksenofono kaj Platono al Sokrato. Mi volus fari tion pro tio, ke mia neforgesebla majstro en la vivo de la homaro estis ne malpli grava fenomeno ol la granda saĝulo de la eta Helenujo.

Ĉiam feliĉega sorto kun fervojista patro

Por rakonti pri tio, kiel sur la serpentumaj vojoj de la vivo okazis renkontiĝo de mia naskiĝanta intelekto kun la granda intelekto de Leo Tolstoj, mi devas reiri tre malproksimen. Pli ol je tri kvaronoj de jarcento, ĝis la tempo de mia frua infaneco.

Mia patro, apenaŭ fininte — kiel inĝeniero — la parizan Politeknikan Superan Lernejon, estis invitita Rusujen de unu el la unuaj francaj kompanioj de fervojkonstruado. Tio okazis je la fino de la sepdekaj jaroj de la pasinta jarcento.

Mi aĝis apenaŭ kvin jarojn, kiam mia patrino veturigis min el Parizo en la koron mem de Turkestano. La patro estis tie estro de sekcio ĉe Transkaspia Fervojo, kies konstruado tiam apenaŭ komenciĝis. Li ĵus estis transloĝiĝinta en la estontan stacion Karakul, ĉe la limo de tiu dezerto, en kies sabla montetaro perdiĝas la rivero Zeraŝan, la praa alfluanto de la granda Amudarja. Ni ekloĝis ĉi tie sur malalta sabluma bordo de la rivero, en arbareto de diversfolia poplo (*populus diversifolia*). Tendaro nia konsistis el tri rondaj, feltaj, turkmenaj "kibitkoj" kaj unu granda, verda, buĥara tendo, subŝtofitita per fajrokolora silko.

La patro tuj aĉetis al mi grandan azenon kaj buĥaran lignan selon kun inkrustaĵoj el falsaj turkisoj. Li dungis por mi buĥaranon, mahometanan indiĝenon, kiu devus ĉiam zorgege akompanadi min ankaŭ surazene. Sed al mia feliĉega sorto ekplaĉis, ke la "Sanĉo

Panza" estu ege maldiligenta, kaj mi — kontraŭe — tute sendependa kaj agemega. Tio okazigis, ke mi tre rapide eklernis fari longajn rajdadojn, tute sola en ĉi tiu tute nekonata kaj interesa lando, en tiu tempo ankoraŭ ne tuŝita de la eŭropa civilizacio. Tiamaniere al mia ĉiam feliĉega sorto ekplaĉis, ke mi tre frue lernu legi en la granda libro de la realaĵoj.

Dum en Eŭropo la bedaŭrindegaj infanoj suferadis en infangardejoj kaj unuagradaj lernejoj, la saĝa besto ekhavis eblecon plenlibere prezenti al mi interesegajn "objektajn" lecionojn, plenajn de pasie vivanta kaj materie reala enhavo.

La lando estis ĵus konkerita de la rusa armeo, kaj la prabuĥara civilizacio ankoraŭ ne estis tuŝita de eŭropanoj. Laŭ la packondiĉoj Hanlando de Buĥaro estis ankoraŭ regata de la antaŭa Emiro. Ĉiuj sociklasoj severe observadis mahometanecon; alkoholtrinkaĵoj ne ekzistis; ŝtelado estis nekonata; malestis rigliloj kaj seruroj. La mahometanaj preĝejoj kun siaj multekostaj tapiŝoj restadis malfermitaj tage-nokte. Mi povis dum semajnoj forgesadi ĉe granda, multe trapasata vojo miajn plej multekostajn ludilojn tute senriske.

Irigacio de la kampoj, ekzistanta en ĉi tiu sekega klimato jam de jarmiloj, estis perfekta. La rivero, vintre sufiĉe larĝa kaj rapida, de la printempo estis disprenata por akvumadi ĝislastgute; kaj la sabluma kuŝujo de la rivero fariĝadis granda vojo.

Pezege ŝarĝitaj kameloj, unu- kaj duĝibaj, nepre kondukataj de azeno, per longvicaj karavanoj sekvalidis ĝin. Ili preterpasadis tie el tre malproksime. El landoj ankoraŭ pli mirindaj: el Persujo, el Afganistano, eĉ el fabelmistera Hindujo.

Turkestano je tiu tempo estis ankaŭ lando de abundo. Zeraŝan — perslingve "donanto de oro" — alfluante de malproksimaj montoj, fruktakvumis ĉi tiun oazejon, la plej dense loĝatan kaj la plej riĉan en Centra Azio . . .

Flavaj legolibroj de Tolstoj


Je la dua vintro ni transloĝiĝis en grandan "saklon" kun dikaj argilaj muroj kaj ebena tegmento ĉe la limo de sarta vilaĝo. Kiam pasis trametado de reloj kaj komencis funkcii fervoja trafiko, ni transmigris al stacio Farab, kie jam estis konstruitaj — el la loke faritaj brikoj — la stacidomo kaj loĝejoj.

Kaj jen, tie, dum unu el la varmaj someraj tagoj, posttagmeze, en blindige blankan domon de la sekciestro alvenis migranta libro-vendisto. Sendube tio estis la unua librovendisto en Transkaspia lando. Sur lia ŝultro, per larĝa rimeno pendis granda, ovala korbo, plektita el blankaj, salikaj vergetoj, plena de broŝuroj, de la en tiu epoko tre ŝatataj kantarlibretoj kaj de ortodoksaj, malklerigaj, porpopolaj, tre malkaraj, eldonaĵaĉoj.

La patrino elektis por mi kelkajn librojn, en kies nom-

DU MEDICINAJ ELDONAĴOJ

Internaj paĝoj
de la eldonaĵo
de Philips →



Recenzas A. Albault (Francujo):

Modernaj tendencoj kaj evoluoj en medicinaj sistemoj por radio-diagnozo, radio-terapio, nuklea medicino, medicina elektroniko, de Divizio por Medicinaj Sistemoj de Philips. Trad. E.L.M. Wensing. Eindhoven (Nederlando): Philips, 1971. 40 p. 17x24 cm. Kolor-ilus.

Envere ne katalogo, sed libreto klariganta al kuracistoj, kion ili atendu de novaj aparatoj kaj sistemoj ellaboritaj de Philips. Libreto abunde kaj moderne ilustrita per fotoj kaj desegnoj, grandparte koloraj.

En flua kaj facila lingvo, kvankam tute moderna kaj ĝisdata, la specialisto estas informita pri la lastaj atingoj de l'tekniko: ĉiu interesita kuracisto petu tiun broŝuron de Philips, Eindhoven, Nederlando.

El terminologia vidpunkto, tiu traduko — plene konforma al Plena Ilustrita Vortaro — montras la ĝisdatecon de Esperanto el teknika kaj el medicina vidpunktoj. El la aldonita folio "Glosaro" mankas interalie *scintigramo* kaj *scintigrafio*, por kiuj oni eble preferos *scintilogramo* ktp... Ni salutu la rezolutan aplikon de formo *komputoro*, "la sola logika formo en nia lingvo" laŭ letero de prof. Waringhien.

Ni gratulu nin, ke gravaj firmoj kiel Philips ne hezitas eldoni tiajn altnivelajn informilojn.

Rangaku kotohajime: Tagiĝo de la eŭropa medicino en Japanio, de Nishi Seiho k.a. Katayama (Japanujo) : Ĉiama Grupo, 1971. 110 p. Ilus. 18 cm.

Jen eta libro, trezoro da dokumentoj por la japana kulturo ĝenerale, por la japana medicino aparte. Post dumjarmila sekvado al ĉinaj teorioj, japanaj medicinistoj konstatis, okaze de nekropsioj, la ĝustecon kaj fidelecon de holandaj anatomiaj bildoj. Sed en la feŭda lando de la Leviĝanta Suno dissekado estis severe malpermesita al kuracistoj, same kiel eĉ nur la skribado de "holandaj" literoj: ni ĉeestas la duoblan klopodegon lerni la lingvon el scio-ĉifonoj, ekscii pri anatomio el la instruado de ... ekzekutisto!

Eŭropa leganto estus preferinta sintezan kaj unufluan ĉion-enprenan rakonton de l'okazaĵoj. La japanoj preferis respekti la dokumentojn, kio kondukas al plurfoja, kvankam tre malsamaspekta, priskribo.

Bona lingvo. Tamen *feŭdala* estas arkaika por *feŭda*; kial neologismi per *aŭtopsio* dum *nekropsio* estas bone establita, tre internacia kaj ideo pli klara?

Dube, ĉu ne sufiĉis *enuis* anst. *enuiĝis* (p. 22). Multaj ilustraĵoj fortigas la dokumentecan karakteron de tiu verko.

Mendu ĉe UEA: 8,40 gld. (por Nederlando 8,74 gld.) plus sendokostoj 10%.

VIVINTE KUN TOLSTOJ

(daŭrigo de p. 129)

bro estis Krestomatio de Paulsen kaj la "Unua kaj dua legolibroj" de Grafo Leo Tolstoj en flavaj kovriloj; krom tio ankoraŭ "La sankta historio"-n en blua kovrilo kun arĝentlitera, slava titolo.

Ĝustasence oni neniam instruis min pri la legado. Legi mi lernis tute mem, ankoraŭ en Parizo, per la ludkubetoj kun francaj literoj. La patrino donacis ilin al mi, kiam mi aĝis apenaŭ tri jarojn; kaj poste mi multe uzis por tiu lernado la sennombrajn anoncŝildojn de la parizaj magazenoj. Mi haltigadis miajn gepatrojn meze de la stratoj por deĉifri la mirindan similecon de literoj sur sennombraj ŝildoj de parizaj magazenoj kun tiuj de miaj kubetoj. Mi penadis tra-legi ilin. Pro tiu okazo oni donacis al mi rusan libron kun bildoj de bestoj kaj rusaj priskriboj. Nun, je la tempo de alveno de la librovendisto, mi jam tute facile legadis france kaj ruse.

Mi prenis la librojn en mian ĉambron kaj komencis legi "La Sankta Historio"-n. Komence estis interese, precipe kiam Moseo elkondukis la judan popolon el Egiptujo, sed kiam aperis miraklo en la dezerto, kiam


Moseo kreis fonton, frapinte rokon per bastono, mi malestime metis la libron for kaj neniam plu mi prenis en la manojn similajn eldonaĵojn.

Poste mi trarigardis la flavajn librojn de Tolstoj. Subite mallonga fabelo kaptis mian atenton: Migranto en dezerto, forkurante de freneza kamelo, falis en puton. Li sukcesis kapti arbeton kaj ekpendi je ĝi. Abrupte minaca bestego ekstaras super li; malsupre, sur la fundo, atendas lian falon la drako. Kaj dume la migranto vidas, ke du musoj — blanka kaj nigra — unu post la alia dentraspas la radikon de la arbedo, al kies branĉoj li estas alkroĉiĝinta... Mi ne plu povis legi. Mia spiro haltis. Mi ekfrostiĝis pro teruro. Blanka kaj nigra! ... Mi tuj bonege komprenis, kiuj estis ĉi tiuj musoj... Tio ĉi estis la situacio de la homo dum sia vivo. Ĉiu momento proksimigadis nin al la morto. Pro emocio mi ne plu povis daŭrigi legadon.

Enpensiĝinte mi aŭtomate daŭrigis foliumadon de la flava broŝuro. Sed ĉe la fino de la libro nova titolo ekfrapis min: "Pro kio estas malbono en la mondo? "...Malbono! Jes, kial kaj pro kio ĝi ekzistas en la mondo? La nekompatigebla, triumfanta, terura! Pro kio? ... Mi jam akre sciis, ke ĝi ekzistas.

Kun grandega intereso mi enprofundiĝas en la legadon...

Victor Lebrun



Pelé

Recenzas Simo Milojević (Jugoslavio):

Mi estas Pelé, aŭtobiografio. El la portugala trad. Francisko Almada. Rio de Janeiro: Kultura Kooperativo de Esperantistoj, 1971. 174 p. Ilus. 24 cm.

Ekzistas multaj kialoj por ke la estontaj historiistoj nomu ĉi tiun jarcenton — la futbala. Se juĝi kvante, oni certe ne trovas alian fenomenon, en kiu ajn

vivosfero, kiu kapablas altiri tiom da atento kaj havi pli da simpatiantoj, apogantoj aŭ partoprenantoj. Futbalo estas la sola fenomeno kiu nun kapablas televide kateni la atenton de pluraj centmilionoj da spektantoj; eĉ la surluniĝo de astronautoj ne povis konkurenci al bona futbalmaĉo.

En la historio de ĉi tiu sporto oni vane serĉus alian personon, kiu tiom kontribuis al la popularigo kaj prestiĝo de futbalo, kiel tion faris Edson Arantes do Nascimento, la glora brazila "futbal-reĝo" — Pelé, sendube unu el la plej popularaj personecoj de nia jarcento.

La apero de la aŭtobiografio de Pelé en Esperanto estas senrezerve salutinda. La libro mem estas facile legebla, ĉar ĝenerale bonstila kaj bone presita (escepte la fotojn). Jen estas nuntempa "fabelo", kiu ja povus bele roli kiel konvena legaĵo en la porjunulaj E-kursoj.

La libro pri Pelé, eĉ de Pelé mem, tutcerte ne bezonas apartan rekomendon, ĉar la nomo mem rekomendas ĝin pli ol sufiĉe.

Mendu ĉe UEA: 18 gld. (por Nederlando 18,72 gld.) plus sendkostoj 10%.

Skribas honora prezidanto H. W. Holmes (Britujo):

La libro *Mi estas Pelé*, la aŭtobiografio de la plej talenta futbalisto, anoncas, ke Pelé apogas Esperanton.

Li kaj Carlos Alberto, la kapitano de la brazila mondĉampiona futbala grupo, decidis apogi la kampanjon de la brazilaj esperantistoj "Esperanto en la sportojn".

Pelé diris: "Esperanto estos tre utila al la sportistoj ĝenerale por ilin alproksimigi kaj faciligi al ili la interrilatojn amikajn kaj sportajn".

Certe tion subtenus kavaliro Stanley Rous, la prezidanto de la Internacia Federacio de Futbalaj Asocioj kaj unu el la patronoj de la 56a UK en Londono. Multaj sportoj estas internaciaj, sed sendube tiu, kiu plej allogas la homamason, estas futbalo. Sekve, la enkonduko de Esperanto por la uzo de la futbalistoj kaj la futbaljuĝistoj ne nur estus por la bono de la sporto, sed estus ankaŭ granda instigo al la futbala publiko lerni la lingvon.

LASTE APERIS . . .

Al Torento; novelo (1930) Stellan Engholm (1899-1960). 95p. 20cm. 5,46 gld. Tria eldono de originala romaneto de sveda aŭtoro pri 16-jara terlaboristo.

Direktivoj de la 24a kongreso de KPSU por la kvinjara plano de disvolvo de la popola mastrumado de USSR dum la jaroj 1971-1975 58p. 22cm. 1,20 gld.

Dolĉa Franclando, La (1972) Pierre Delaire. 124p. Ilus. 22cm. Bind. 21,—; broŝ. 15,18 gld. Kun vigla kaj persona rakonta stilo la aŭtoro gvidas la leganton de regiono al regiono. Multaj fotoj.

Hilelismo, projekto pri solvo de la hebrea demando (1901) L.L. Zamenhof. El la rusa originalo tr. A. Holzhaus (1972). 86p. Frontispico. 21cm. 18,72 gld. Paralelaj tekstoj rusa kaj Esperanta. Zamenhof proponis purigi la hebrean religion kaj krei por hebreoj proprajn lingvon kaj teritorion.

Historia kaj filozofia fono de la moderna pacifismo Harold Bing. Esperanta eldono 1971. 28p. 17cm. 1,26 gld. Eld. Internacio de Militrezistantoj.

Insigno Ronda, diam. 8mm. Kun pinglo longa 43mm. Verda stelo sur blanka fono. Taŭga por mantelo aŭ jako. 1,62 gld.

Kvin filozofiaj verkoj de prezidanto Maŭ (1972) 287p. 14cm. Plaste bind. 1,— gld. Originaloj el 1937, 1957 kaj 1963.

Lingua internacional, A (1971) Egon Breitenbach. 12p. 15cm. 0,30 gld. Brazila artikolo pri Esperanto.

Liriko Lesja Ukrainka (1871-1913). Komp. N. Andrianova. El la ukraina tr. K. Gusev k.a. 86p. Ilus. 21cm. 1,80 gld. Poezio tute trapenetrita de ukraina folkloro kaj amo al la popolo kaj al libero.

Problems of languages planned for international use (Esperanto and naturalistic projects) William Gilbert. El Esperanto en la anglan tr. D. Charters. 48p. Mimeo. 28cm. 6,24 gld. Kritika eseetaro pri la lingvoteorioj de la partianoj de "naturalismaj" lingvoprojektoj, el vidpunkto de esperantologo.

¿Qué es el Esperanto? (1971) Eld. Hispana Esperanto-Instituto kaj eldonejo Sopena. Informfolio. 0,06 gld.

Rakontoj el pluraj landoj Fred Parker. 89p. 21cm. 2,58 gld. La aŭtoro originale reverkis en Esperanto rakontojn kolektitajn dum libertempoj en multaj landoj.

Skizo de la historio de bulgara Esperanto-movado (1971) Komp. Ivan Sarafov. 58p. Mimeo. 30cm. 6,— gld. Kun tabelo de kongresoj kaj bibliografio.

Proliferu SemLK-j

Recenzas Probal Daŝgupto (Hindujo):

Seminario "Lingvo kaj kulturo". Rotterdam: TEJO, 1971. 135 p. Mimeografita. 29 cm.

Pri ĉi-speca mikspoto ne opinieblas unudimensie. *Raporto SemLK* (SemLK = Seminario "Lingvo kaj Kulturo") inspiras multkriterian takson, sed spaco permesas nur krokizi la precipon: neprelegendaĵo por ĉiu interesato pri la nur nun ekesploritaj aspektoj kromgramatikaj de lingvoj aŭ la rilato inter ies lingvo(j) kaj tiu parto de lia menso, kiu specifeblas homa (superbesta). Kvankam sindediĉo de homoj, kiuj "ĉe la piedoj de la Majstro" laboras pro fido senkritika, multon akiris kaj -os por nia afero, probable dezirindas, ke aktivaj esperantistoj trapensu, por kio ili aktivigas, ke ilin intereso do tiuj rilatoj kaj aspektoj. Mi opinias unu LK-seminaron sensenca, se ne postvenas samtemaj pli partoprenataj kaj celtrafaj. Proliferu SemLK-j; por celtrafo necesas, ke laborripeto minimumu (certigos tion regula represado de ĉi tiu kaj estontaj raportoj), ke estu konsciataj la seminarioj (ĉu la NEJO-komisiono efike informas pri ĉi tiu raporto intereseblulojn neesperantanajn?).

Mendebla en Esperanto, en la angla, franca, germana aŭ nederlanda ĉe Komisiono por Eksteraj Rilatoj; (Kastelenstraat 231, Amsterdam-Z, Nederlando): 3,50 gld. plus sendokosto 0,70 gld.

Rafinita virtuozece en 17-silabaj hajkoj

Recenzas Ivo Rotkvić (Zagreb)

Nokturno '71: hajkaro, de Hajkista Klubo. Oosaka: Hajkista Klubo, 1971. 44 p. Ofsetita. 18 cm.

Kiam mi legodrone ĝiskovrilis la libreton, min ekobsedis la impresoj, ke iu antaŭ mi fingropuŝete rulturnis magian japanan sunombreton kun silkecaj bildoj sure.

La hajkista kvinopo, Tomita Tomu, Ueyama Masao, Tanaka Sadami, Miyamoto Masao kaj Murata Keinosuke, deponis en la memstarajn verstufetojn multe da varia belo. Tamen la kurbildoj ne fordefinitivas en rigidajn skemojn, ili estas nur delikate punktitaj krokizoj, tra kies lumsorĉo elsubitas rezignacia, disonanca kontrapunkto. Jen paĝ-hazarda pluketo:

*Stelbrilo frostas,
malgraŭ memfid' pri l'vivo
solec' ĝisostas* (Ueyama Masao)

aŭ:

*Somera maro
min englutis, nutras ŝarkojn.
Ĉu viv' — koŝmaro?* (Miyamoto Masao)

Kial ni tiel hipnotigite subfalas al tiu ĉi rafinita virtuozece kaj larĝapulme enspiras freŝventan klimaton el la hajkaj versoj? Eble pro la paradoksa kontrasto: en la hom-muela industria gigantismo de la nuna mondo tiu ĉi poezio distavoligas la artefaritajn urbanismajn strukturojn kaj ebligas al ni forzili en virgan naturon.

Sed krom la poezia frandlogo la hajka versarto havas ankaŭ apartan gravecon por nia Esperanta semantiko. Kunpremitaj — ĝis stebkrevo — en versetojn, la vortaj senckernoj pli kaj pli maturiĝe disŝvelas kaj tiel signife riĉigas la lingvon. Do, ne estas nura sukerkovraĵo la aserto, ke la Nokturno '71 meritas esti legata unu-, du- — plurfoje!

Mendu ĉe UEA: 1,20 gld. (por Nederlando 1,25 gld.) plus sendokostoj 10%.

Krono de la jugoslava poezio

Recenzas Simo Milojević (Jugoslavio):

La Montara Krono de P.P.Njegoŝ. Esperantigis Svetislav S.Petrović. Cetinje (Jugoslavio): Obod 1970. 278p. 19cm. Bindita.

Petro la 2a, Petrović Njegoŝ, en la unua duono de la 19a jarcento, episkopo kaj reganto de la malgranda balkana ŝtato Montenegro (nun parto de Jugoslavio), estas poeto kiu egalrangas al la plej geniaj poetoj, kiujn nia terglobo konas. Nur la dama lingva baro katenis lian gloron inter la montoj de lia regno, kaj ne permesis, ke lia ĉefverko *La Montara Krono* samtiom eduku kaj influu la mondon, kiel tion faris ekz. *La Dia Komedio*, *Hamleto*

aŭ *Faŭsto*. Ĉar, ke depost la jaro 1847, kiam la verko unuafoje aperis, *La Montara Krono* estas preskaŭ ĉiujare reeldonata en Jugoslavio, — tio ja per si mem multon diras pri la esence filozofia verko de Njegoŝ.

La giganta literatura figuro de Njegoŝ estas mem *krono* de la popola poezio, kiu verŝajne nenie en la mondo tiom floris kaj atingis tiajn suprojn, kiel ĉe la sudslavaj popoloj. La tuta literatura verko de Njegoŝ, kaj aparte *La Montara Krono*, uzas la lingvaĵon de la popola, folkloro eposo, ekstraktante ĝian netan kvaliton kaj ĝian subliman belon.

Eble ĝuste pro tio, la verko prezentas apartajn malfacilaĵojn ĉe provoj traduki ĝin. Tial des pli admirindas la laboro de Svetislav S.Petrović, kies tradukon ni nun havas en la Internacia Lingvo. La mesaĝo de la verko, kiu en harmonia kombino de liriko, epopeo kaj dramo priskribas batalon el la komenco de la 18a jarcento, ankoraŭ plene aktualas; oni ja eĉ nun ne pacas sur nia terglobo.

Restas por bedaŭri, ke ŝajne la preparlaboroj por eldoni tiun ĉi libron okazis iom izolite, pro kio, supozeble, ĉi tiu ĉefverko de la monda literaturo ne trovis lokon en la konata Serio "Oriento—Okcidento", kvankam ĝi per si mem troviĝas inter la du hemisferoj, kaj post iom da plia poluro, ĝia traduko meritis tion.

Mendu ĉe UEA: 15.- gld. (por Nederlando 15,60 gld.) plus 10% sendokostoj.

Bonvena legolibreto

Recenzas Ergoto de Bonaero (Argentino):

Ŝercoj, rakontoj. Kompilis Vilmos Benczik. Budapest: Tankönyvkiadó, 1972. 104p. 16cm.

La kompilaĵo konsistas el kvar partoj: ŝercoj, fabeloj, rakontoj kaj poemoj.

La libro, plejparte verkita en simplaj stilo kaj lingvo, estas tre bonvena legaĵo por komencantoj kaj progresintoj, sed kompreneble ankaŭ spertaj esperantistoj kun plezuro tralegos ĝian spritan kaj varian enhavon.

La fabelaro havas diversnacian devenon. Estas fabeloj hungaraj, dana, japana kaj ĉeĥa.


Inter la originalaj rakontoj troviĝas la spritegaj: *Genezo* de S. Szathmári; kaj *Min kompatu, Dio!* de Ueyama-Masao; kaj la kortuŝa *Simpla konfeso* de L. Böti. Ankaŭ estas bonaj kontribuoj de J. Baghy, J. Hammond Rosbach kaj F. Szilágyi.

Inter la tradukitaj rakontoj: *Telefono* enhavas ne-kutimajn dialogojn!; kaj *Ruti kaj Tomeu* prezentas surprizan finon.

Inter la poemoj ŝatindas *Pur-kore*, elhungara traduko de K. Kalocsay; kaj la amuza originalaĵo: *Foirfesta kanto pri Esperanto-instruisto*, de Tomáš Pumpr.

Je la fino estas Notoj pri la aŭtoroj kaj vortareto por hungaroj. Konklude: tre leginda verko!

Mendu ĉe UEA: prezo anoncota.



Pligrandigi interŝanĝon de libroj



Skribas Pavel Polnický (Ĉeĥoslovakujo)

En la januara numero estis publikigitaj tri artikoloj pri la libro-problemo en nia movado. Kvankam mi estas pli juna ol tiuj tri eminentuloj, mi kuraĝas, post tri-jara funkciado kiel pagata sekretario de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, ankaŭ esprimi mian opinion pri tiu ĉi problemo.

Nia Asocio, fondita en marto 1969, eldonis jam tri gravajn publikaĵojn: *Libro de apokrifoj* de Karel Čapek, *Paŝoj al plena posedo* de W. Auld, *Sileziaj kantoj* de Petr Bezruč. Kunlaboris pri eldono de malpligrandaj broŝuroj "ABC" kaj "LMR" de T. Kilián kaj aliaj. Samtempe ĈEA helpis per konsiloj kaj kunlaborantoj al "Kartografie" en Praha eldoni *Poŝatlasojn de la mondo*.

Kiaj, do, estas niaj spertoj? Ni sukcesis disvendi: *Libro de apokrifoj* (eld. 1970-09-16) dum 16 monatoj — 2500 ekz.; *Paŝoj al plena posedo* (eld. 1970-12-18) dum 13 monatoj — 1900 ekz.; *Sileziaj kantoj* (1971-04-06) dum 10 monatoj — 1000 ekz.

Tiu ĉi rezulto estas certe sukcesa, sed kio restas ankoraŭ farenda? Nian movadon ni tre ofte fiere nomas internacia, tutmonda kaj ni parolas pri bona kunlaboro en diversaj laborkampoj kaj rilatoj. Ĉu ni povas tion diri ankaŭ pri libro-eldonado kaj disvendado? Mi opinias, ke ne! Realo ĉiutaga restas la fakto, ke ekzistas multaj landoj, kiuj havas malfacilaĵojn rilate la pagipovon. Tamen en tiuj landoj funkcias vigla kaj sufiĉe grandnombra esperantistaro. Por ebligi ankaŭ al tiuj membroj aĉetadon de la libroj, ni devas pligrandigi interŝanĝon!

Respondas la redakcio

Ĉu temas pri interŝanĝado de libroj, ĉu pri reciproka aĉeto kaj vendo, la problemo restas la sama. Efektive la kreskanta eldono de internacie disvendeblaj Esperanto-libroj en Ĉeĥoslovakujo malfermas la perspektivon havigi al la tiulandaj legantoj pli da eksterlandaj eldonaĵoj. Bedaŭrinde, ankoraŭ en kelkaj landoj kun valutaj limigoj la Esperanto-eldonado lamas aŭ eĉ tute mankas. Ni tial jam en pli frua numero de "Esperanto" forte rekomendis al niaj membroj en tiaj landoj instigi sialandajn eldonejojn imiti la ekzemplon de landoj kiel Ĉeĥoslovakujo.

Gajni unu novan membron

Skribas Julius Balbin (Novjorko):

La ideo elsendi provekzempleron de *Esperanto* al la abonantoj estis bonega, almenaŭ laŭ mia opinio kaj... sperto. Mi esperas, ke multaj aliaj membroj de UEA utiligis la provekzempleron kaj gajnis membrojn same kiel mi. Ni povas imagi, kio okazus, se ĉiu membro gajnus *nur* unu novan membron. La membraro de UEA duobligus. Gajni unu novan membron estas pli facile, ol oni imagas. Oni devas tion nur forte deziri kaj ekagi laŭ tiu deziro.

Skribu al radiostacio

Skribas agadgrupo Inter (Svedujo):

Ĝis nun Radio de Svedujo ne trovis eblecon enkonduki Esperanton pro manko de sufiĉe vasta buĝeto, t.e. mankoj de ekonomio kaj sendohoroj. Nun, en 1972, la cirkonstancoj pliboniĝis, precipe per la konstruo de tri novaj sendiloj, kiuj laboras kun kvinoble pli granda povo, ol la pli fruaj du sendiloj por tutmondaj programoj.

En la agadgrupo Inter oni insiste laboras per konstantaj rilatoj al la programa direkto. Feliĉe la direktoro de la programsekcio por eksterlando havas tre pozitivan kaj ĉiam afablan sintenon al proponoj flanke de la esperantistoj. Laŭ diversaj vojoj Inter ankaŭ provas influi la ministerion por certigi la necesan monon por programo ankaŭ en Esperanto. Tamen, nun estas treege grave, ke la esperantistoj amase skribu al Radio de Svedujo, Programo al la mondo (S-105 10 Stokholmo).

Kiel legi la daton?

Skribas Stoppoloni Umberto (Italujo):

Se oni volas uzi la rekomendon de Internacia Organizaĵo por Normigo rilate al la datado en internaciaj rilatoj, kiel raportite en *Esperanto* (n-ro 793, p. 17), mi opinias, ke ne estos malfacilaĵoj en la legado, ĉar ĉiu vorto de la dato mem finiĝos per la vokalo -a de la adjektivo kaj, per tiu, distingiĝos de la aliaj. Por la ekzemplo 1971-10-02: *milnaŭcent-sepdekunua, deka, dua*, kaj estas necese, ke oni subkomprenu la ellasitajn vortojn: jaro, monato, tago.

Skribas Dermot J.F. Quirke (Britujo):

Vi demandas "kiel legi ekzemple 1971 10 02?" Ĉu estus tro simple sugesti, ke oni legu "la dua(n) de oktobro (en la jaro) mil naŭcent sepdek unu(a)"? Ĉar temas finfine pri normigo de la *skribmanieroj*, kiuj ĝis nun tre varias de lando al lando. Kontraste, la maniero voĉlegi datojn estas jam normigita ĝis kontentiga grado (eĉ en la Fundamento), kaj neniel necesas nek utilis tuŝi ĝin.

Plezuriga financa situacio

Skribas Roland Jossinet (Parizo):

Mi plezure legis en via ĉefartikolo (*Esperanto*, n-ro 797), ke la financa situacio de UEA en 1971 ekvilibris. Mi kore gratulas kaj, pro tio, mi decidis fariĝi membro-subtenanto jam por 1972, kaj principe restos tia, nur se la estontaj financaj situacioj ankaŭ ekvilibros.

LOKE

Aŭstralio

- Nove starigita "Sendependa Universitato de Aŭstralio en Morwell, Victoria, akceptis Esperanton kiel regulan studobjekton por la licenciaj kursoj. Dek studentoj elektis Esperanton en sia unua studojaro.

Britujo

- Sekve de la televidaj kaj radiaj Esperanto-kursoj en pluraj landoj, britaj esperantistoj lastatempe lanĉis kampanjon por akiri subtenon de parlamentanoj por enkonduko de Esperanto-kursoj en radion kaj televidon. (La adreso de la organizantoj: Esperanto-Lobby, 601 Duncan House, Dolphin Square, London SW1. La adreso de la brita radio BBC: Broadcasting House, London W1.).

Danlando

- La junulara grupo de dana partio "Justeco" lastatempe decidis unuvoĉe en sia jarkunveno skribi proponi al Unuiĝintaj Nacioj, ke U.N. solvu la lingvan problemon per efektiva kaj efika helpo al disvastigo de la neŭtrala Internacia Lingvo Esperanto, rekomendante ankaŭ al la Ŝtatoj-Membroj progresigi ĝian instruadon kaj stimuli ĝian uzon en la internaciaj rilatoj de la popoloj.

Finnlando

- En julio-aŭgusto la lingva sekcio de la finna radio elsendas por enlandaj aŭskultantoj 2 programojn po kvaron-horo en Esperanto: la unuan en la 27a de julio. En ĝi s-ro Harri Melasniemi, fakdelegito de UEA en Turku, intervjuas s-ron E.D.O. Woessink el Nederlando.

- La Esperanto-grupo en Tampere aranĝis kurson de Esperanto por membroj de la loka Societo por Amikeco inter Finnlando kaj Ĉinujo. Ĝi rekomendas similan agadon al aliaj grupoj en lokoj, kie ekzistas tiaj amikeco-societoj, kies membroj povas sperti apartajn lingvajn malfacilaĵojn pro la malsimileco inter la lingvoj de la koncernaj landoj.

Francujo

- En Calais, meze de junio 1972, oni donis oficiale al 6 novaj stratoj la nomojn de 6 elstaraj personoj. Inter ili troviĝas Zamenhof, pri kiu loka ĵurnalo detale raportis.

Germana Demokratia Respubliko

- 200 personoj ĉeestis la Centran Konferencon de Esperantistoj de G.D.R. en Germana Kulturligo, okazintan en Berlino de la 27a ĝis la 28a de majo 1972. Aparte grandan sukceson havis ĝia kultura vespero kun la kunlaboro de pola artistino.

NEKROLOGO

OCTAVIO VIANNA PEIXOTO

Octavio Vianna Peixoto, multjara membro kaj delegito en Niteroi (Brazilo), mortis en la 7a de majo 1972, estante 80-jara. Krom gvidi kursojn, li multfoje parolis per radio por disvastigo de la Internacia Lingvo.

LOKE - FAKE - PE

Indonezio

- La literumsistemo de la indonezia lingvo, establita en 1901 de nederlandano Van Ophuysen kaj modifita en 1947 de la tiutempa Ministro de Edukado kaj Kulturo (Suwandi), staras nun antaŭ denova modifo konforma al la postulo de lingvo moderna, scienca kaj internacia laŭ vidpunkto de transskribado. Tion proponis en la pasinta marto kunveno de pli ol 70 lingvistoj, instruistoj, verkistoj kaj ĵurnalistoj.

Italujo

- La jam tre konata "Miela Luno" en Rimini, organizata de turisma entrepreno Azienda di Soggiorno kaj de la asocio de la hotelestroj de Rimini, ĉi-jare dolĉe bonvenigis en junio 3 esperantistajn parojn inter 42 paroj el deko da eŭropaj landoj. Ili ĝuis 1-semajnan senpagan restadon en unuaklasa hotelo.

Portugalujo

- Post la repermeso de Esperanto-instruado en Portugalujo fondiĝis la 15an de marto 1972 nova Portugala Esperanto-Asocio, kies estraro estis elektita la 10an de majo. Adreso: ĉe s-ro Adolfo Nunes, Costa do Castelo, 70, 1º, Lisboa 2.

Antaŭ nelonge kafejo "Esperanto" estis malfermita en la Kultura Centro en Carmel-by-the-Sea (Kalifornio, Usono), 125 mejlojn sude de Sanfrancisko. Staranta ĉe la enirejo estas d-ro B. J. Balcar, arkivisto de Esperanto-Ligo de Norda Ameriko.





En Cluj (Rumanujo) esperantistoj organizis festan aranĝaĵon okaze de la Internacia Infana Tago. En la programo partoprenis ankaŭ infanoj. Poemon deklamis junpioniro Kónya Zsolt (foto). Oni prezentis interalie pupteatron.

PERSONE

Linton

- La ĉefdelegito de UEA por Aŭstralio, s-ro K. G. Linton, vizitis Hindujojn en la frua parto de 1972, ĉeestis ĝeneralan kunvenon de Hinda Instituto de Esperanto kaj helpis la lokan movadon.

Wüster

- La ŝtatprezidanto de Aŭstrujo honorigis prof-on d-ron Eugen Wüster, la konatan esperantologon kaj terminologon, per la titolo de "eksterordinara altlernej-profesoro". (Decido de la 2a de majo 1972.)

FAKE

Aŭtomobilistoj

- Havante 700 membrojn en 26 landoj 3 jarojn post la fondiĝo, Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista (IEKA) antaŭ sia jarkunveno dum la 57a UK en Portlando (Oregon) dissendis al ĉiuj aŭtomobilistaj revuoj en Usono (proks-e 70) informojn pri la uzado de la Internacia Lingvo en aŭtomobilismo kaj pri la kunveno de IEKA en Portlando.

Fervojo

- La ĉi-jaran kongreson (de la 6a ĝis la 12a de majo en Lugano, Svislando) de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, partoprenis 672 personoj el 18 landoj. Pluraj ĵurnaloj, radio kaj televido en Svislando detale raportis pri la kongreso. Ĝiaj diversaj kunvenoj fruktodone laboris, same kiel ĝia informa servo.

Ĵurnalismo

- Laŭ la invito de la ĵurnalista asocio en Kubo restadis tie dum aprilo kaj majo 1972 la redaktoro de la organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, s-ro O. Kníchal. Li utilis tiun ŝancon ankaŭ por renkonti membrojn de Havana Esperanto-Rondo.

Kosmo

- Por la komuna kosmoflugo soveta-usona, okazonta en 1975, estos elektitaj usonaj astronautoj, kiuj flue parolas la rusan, kaj rusaj kosmonaŭtoj, kiuj flue parolas la anglan. Ankaŭ en tiu nova internacia medio, do, same kiel nun en la diplomatio, povos okazi, ke la personoj plej kapablaj por la laboro estos flankenmetitaj, se ili ne scipovas fremdajn lingvojn.

Pupteatro

- Unu el la rumanaj ŝtataj pupteatroj ludis de la 10a ĝis la 22a de aprilo en Jugoslavio Esperantan pup teatraĵon "La Lanug-Hometo", kiu ravis la infanojn en la pasintjara Pupteatra Internacia Festivalo (vd.: *Esperanto*, n-ro 793, p. 12) kaj gajnis ĝian unuan premion el la lingva vidpunkto. Kelkaj aliaj rumanaj ŝtataj pupteatroj nun preparas sin por nove partopreni la ĉi-jaran Festivalon.
- La urbeŝtato de Białystok (Pollando), naskiĝurbo de Zamenhof, decidis atribui al la 5a Pupteatra Internacia Festivalo okazonta en Zagreb (Jugoslavio) de la 30a de septembro ĝis la 6a de oktobro 1972 kaj al ĉiuj teatroj partoprenontaj al ĝi specialan honorpremion de la urbo pro la evoluigo de Esperanto. Ĝis nun sin anoncis por la Festivalo teatroj el 9 landoj, kiuj prezentos entute 72 teatraĵojn en Esperanto. (Aliĝebla ĉe: IKS, Amruŝeva 5/I, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio).

Radio

- Krom la ordinarajn programojn, oni povas senpage ricevi de Pola Radio ankaŭ mimeografitan instrukcion "Kiel aŭskulti radion?". Kadre de la "Radio-Vortaro de Esperanto" baldaŭ aperos ankaŭ terminaro pri "futbalo", same senpage havebla ĉe Pola Radio (adreso: Poŝtokesto 46, Varsovio 1, Pollando).

Religio

- La studasocio de la svedaj sendependaj eklezioj asignis sian unuan kulturŝtendon al s-ino Anna Alamo-Sandgren, aktive aganta ekde la jaro 1947 kiel dungita informistino de la sveda sekcio de Kristana Esperantista Ligo Internacia. Inter ŝiaj meritoj oni mencias ŝian internaciskalan informadon.

Teatro

- Teatraĵo "La reto" de Bukar, verkita originale en Esperanto (vd.: *Esperanto*, n-ro 794, p. 26), denove estos ludata en pariza teatro "Absidiolo" (adreso: strato Frédéric Sauton 5) de alia teatra grupo, de la 22a de aŭgusto ĝis la 3a de septembro 1972 ĉiuj vespere je la 19a horo (escepte de lunde).



TEJO-redaktoro: G.D. Winkler, Jaegerstr. 27, D-42 Oberhausen-Sterkrade, FR Germanujo

J.E.L.I. — Junulara Esperanto-Ligo Israela

Evidente Israelo, estante mem juna nacio, urĝe bezonas junularan organizon. Ĝis 1970 funkciis en Israelo t.n. "Norda Grupo" kaj E.L.I. — Esperantista Ligo Israela, kies membroj estis precipe plenkreskuloj (kelkaj inter ili eĉ lernis Esperanton eksterlande, antaŭ ol ili ekloĝis en Israelo).

Dum la lastaj jaroj kelkaj kursoj de Esperanto okazis ĉiujare en diversaj israelaj urboj: en Jeruzalemo, en Tel Aviv, en Haifa, en Kfar-Saba ktp. Instruis plenaĝaj membroj de la sube menciitaj asocioj. Kompreneble, inter la kursanoj estis ankaŭ gejunuloj.

En 1970 troviĝis sufiĉa nombro da gejunuloj, kiuj decidis, per helpo de s-ro Francisko Simonnet, fondi junularan sektion de Esperantistoj en Israelo. Komence estis nur ok aktivaj anoj, precipe gestudentoj. Ili nomis sin J.E.L.I., kaj dividis inter si la diversajn funkciojn de la administrado, kaj venis al konkludo, ke ilia senprokrasta celo estas disvastigi Esperanton inter la israela junularo, kiu ne estas sufiĉe konscia pri tiu lingvo internacia. Laŭplane malfermiĝos ankaŭ en proksima estonteco kursoj de Esperanto en mezlernejoj kaj en universitatoj, kaj inter la junaj geinstruistoj nun ankaŭ troviĝas JELI-anoj.

Kiel prezidanto de la provizora komitato de JELI elektiĝis Moŝe Ben-Porat, kiel vicprezidanto Uzi Sela. Ĉiuj JELI-estraranoj kunvenas regule unufoje monate, preparolante la aktualajn problemojn koncernantajn junajn esperantistojn en Israelo, kaj klopodas solvi ilin; JELI ankaŭ disponas regulan paĝon en "Nia Ligilo", la bulteno de la plenkreskaj israelaj esperantistoj.

Kiu ŝatus krei pluan kontakton kun JELI, bonvolu skribi al: Junulara Esperanto-Ligo Israela, p.k. 4070, 31040 Haifa, Israelo.

Jen tri el aro da niaj polaj belulinoj. Se vi ŝatas konatiĝi kun ili, tuj aliĝu al ĉi-jaraj kongresaj aranĝoj de TEJO en Pollando.



Ĉ.E.J.O. — Ĉilia Esperantista Junularo

En la jaro 1971 revigliĝis la esperantista agado en Ĉilio. Laŭ iniciatoj de Iván Mättig julie okazis Esperanto-ekspozicio en ŝtata liceo en Santiago, vekante la intereson de la lernantoj kaj instruistoj; en sama knabina liceo en septembro de tiu jaro komenciĝis kurso por ĉirkaŭ tridek junulinoj aĝaj de 15 ĝis 17 jarojn. En alia, unuagrada lernejo, en Santiago, okazis kurso por infanoj inter 10- kaj 12-jaraĝaj.

En novembro 1971 vizitis Ĉilion d-ro Hans-Michael Maitzen, vicprezidanto de TEJO. Profitante tion la juna ĉilia esperantistaro aranĝis gazetaran konferencon en salono de la Universitato de Ĉilio en Santiago. Ĝi havis bonajn rezultojn: unu el partoprenintaj ĵurnalistoj, redaktoro de amasgazeto, aperigis en sia gazeto ampleksan informan artikolon. — La fakto, ke kun la titolo "d-ro Hans-Michael Maitzen" (dudeknaŭjarulo) oni aperigis foton de ĉirkaŭ kvindekjara sinjoro, amuzis la anaron pli ol kolerigi ĝin; gravis la efiko: post nur malmultaj tagoj oni ricevis jam pli ol centon da leteroj el diversaj urboj de la lando, ĉiuj de personoj, kiuj volas lerni Esperanton; ili jam povas lerni la Internacian Lingvon en siaj propraj hejmoj per nova Esperanto-kurso verkita de Iván Mättig, kiu estas speciale adaptita al ĉiliaj cirkonstancoj. Ankaŭ tiurilate montriĝas unua sukceso: jam en 1971 petis ĝin pli ol ducent personoj nur en Ĉilio.

Okaze de dua vizito de d-ro Maitzen al Santiago, oni petis aŭdiencon en la Ministerio pri Edukado. La esperantistan delegacion de s-roj Maitzen, Baraona, Mättig kaj Azorín akceptis la ĉefo de la ministra kabineto, kiu aŭskultis kun granda intereso, kaj petis post sufiĉe detala informado pri daŭra informado.

Nelaste la junaj ĉiliaj gesamideanoj ankoraŭ ŝatus danki al ĉiuj gejunuloj de TEJO, kiuj kontribuis per sia mono al donaco de la 50 poŝvortaroj senditaj al Ĉilio post la IJK en Edinburgo. Dank' al tio, multaj ĉiliaj gejunuloj pli facile povas nun lerni la Internacian Lingvon.

Kiu ŝatus kontakti la ekflorantan ĉilian esperantistan junularon, skribu al la gvidanto, s-ro Iván Mättig Catálan, Ejército 180, Santiago, Ĉilio.

IOM PRI PKS '72

Paske en Grésillon, konata esperantista kulturdomo, okazis la ĉijara Paska Kultura Semajno (PKS) de UFE (Unuiĝo Franca por Esperanto), ĉiĉfoje aranĝita de JEFO, la franca sekcio de TEJO. Krom la seminaria ĉeftemo "Kien evoluas la mondo?", diversgradaj lingvo-kursoj kaj tagfinaj distraĵoj, kiel apudfajra kaj konjaka vesperoj kaj balo, okazis ankaŭ interesa ekskurso al Angers.

Menciindas krome la ĉefaj rezultoj de enketo farita inter la 83 partoprenintoj (ne ĉiuj junaj). Aĝo 59,6% inter 16 kaj 25 jaroj; profesioj: 40,7% studentoj, 33,3% instruistoj; kaŭzo por partopreno: 37,8% ĉefe partoprenis pro la atendita etoso; kio plej interesis: 43,4% plej aprezis la kontaktojn kun aliaj partoprenintoj.

Resume: la ĉiujaraj paskaj aranĝoj de JEFO certe partoprenindas.

LA UNUA DATREVENO DE NIA NASKIĜOTAGO

Precize antaŭ unu jaro, en la julio-aŭgusta numero de la jaro 1971, aperis la rubriko "Komenco bona — ĉio bona" por la unua fojo en tiu ĉi revuo. Ĝia apero estis la sekvo de decido — kiun faris la Estraro de UEA — *ĉesigi* la eldonon de la monata gazeto "La Praktiko", kiu montriĝis *deficita*. La sub-titolo de "La Praktiko" estis: La gazeto kiu instruas kaj amuzas. La Estraro de UEA petis vian redaktoron redakti la novan rubrikon tiel, ke ĝi *laŭeble* daŭrigu la subtitolan devizon de sia antaŭulo, alivorte, ke ĝi instruu kaj amuzu, ke ĝia lingvaĵo estu simpla, por ke ĝi prezentu facile legeblan prozon al tiuj, kiuj studis kaj ellernis la elementan gramatikon de nia lingvo.

Kaj nun, post unu jaro, mi *scivolas*, ĉu tiuj celoj estas iomete kontentige atingitaj. Danke al la sindona kunlaboro de kelkaj kontribuantoj, ni sukcesis, mi kredas, variigi la enhavon de la rubriko. Sinsekve ni prezentis al niaj legantoj spritaĵojn, bonhumorigajn legaĵojn, anekdotojn, konsilojn pri leter-skribado, klarigojn pri gramatikaj subtilaĵoj — tiuj malicaj ŝtonetoj, sur kiuj eĉ lingvo-spertuloj kelkfoje facile stumblas — informojn pri la organizita Esperanto-movado kaj pri Universala Esperanto-Asocio.

En kelkaj artikoloj ni celis unuavice pligrandigi vian vort-provizon (futbalo — aŭtomobilo).

La celo de tiu ĉi rubriko NE estas ĝisfunde esplori kaj analizi lingvajn demandojn, nek profunde okupiĝi pri gramatikaj problemoj. La veraj interesiĝantoj ja havas je sia dispono (aŭ povas havigi al si) abundon da materialo por kontentigi sian scivolemon aŭ lernemon.

Povas esti, ke, malgraŭ niaj sinceraj kaj bonintencaj klopodoj, ni tamen maltrafis la celon. Povas esti, ke, ĝenerale, oni ne trovis en tiu ĉi rubriko tion, kion

oni esperis trovi. Dum la pasinta jaro via redaktoro ricevis multajn leterojn de legantoj, kaj li tre ĝojas pri la fakto, ke preskaŭ ĉiuj laŭdis la rubrikon kaj trovas ĝin celtrafa. Sed..... multaj el tiuj, kiuj skribis al li, ne estis "lingvaj komencantoj" sed progresintaj esperantistoj. Precipe la artikolo pri transitivaj kaj netransitivaj verboj (februaro 1972) elvokis sufiĉe vastan eĥon, kio do klare montras, ke la radika karaktero de la Esperantaj verboj okupas multajn spiritojn. Ĉar la rubriko "Komenco bona — ĉio bona" deziras antaŭ ĉio servi al siaj legantoj, via redaktoro tre ŝatus ricevi la honestan opinion de tiuj, kiuj regule legas la rubrikon, egale ĉu ili estas lingvaj komencantoj aŭ gvidantoj de kursoj. Viaj komentoj, kritikoj, deziroj aŭ sugestoj estos nia *gvidfadeno* en la estonta redaktado de via rubriko. Kaj anticipe.... koran dankon!

Klarigoj:

ĉesigi: haltigi - igi ĉesi. "Ĉesi" estas netransitiva verbo, do: io ĉesas (la pluvo ĉesas - ĉesas plui - la laboro ĉesis ĉirkaŭ la kvina horo). Post "ĉesi" oni ankaŭ uzas infinitivon kiel nerektan komplementon, ekzemple: Li ĉesis paroli; kiam la popoloj ĉesos miskompreni sin reciproke? ; li ĉesis priatenti ŝiajn senfinajn plendojn. En transitiva senco oni uzu "ĉesigi" (tio ĉesigis la diskuton inter ili; kiu okazajo ĉesigis la militon?).


deficita: kaŭzanta malprofiton, mon-perdiga.

laŭeble: laŭ (mia, ĝia, ilia) ebleco. (Komparu ankaŭ: laŭmezure = laŭ la mezuro; laŭlonge de la rivero = laŭ la longo de la rivero; laŭtekste = precize laŭ la teksto, ktp.).

scivoli: voli scii; ege deziri scii (komparu: scivolema - scivolemulo - scivoleco).

gvidfadeno: fadeno, kiu gvidas iun; gvidilo. Kompreneble, la vorto "fadeno" estas ĉi tie uzita metafore (komparu: li perdis la fadenon de sia parolado = li ne plu prezentis siajn argumentojn en logika sinsekvo).

NIAJ KARAJ ETULOJ



Belforma, juna vidvino kuŝas sur la plaĝo, bruniĝante en la suno. Apud ŝi sidas ŝia sepjara fileto. Jam baldaŭ venas juna, forta viro, fortike konstruita, kiu metas sin en la tujan proksimecon de la rava belulino. Post kelkaj minutoj lin alparolas la fileto. "Mia nomo estas Marko — kaj kiel vi nomiĝas? "

"Karlo Piraso",

"Mi estas sepjara kaj kiomaĝa estas vi? "

"Mi havas preskaŭ tridek kvin jarojn".


"Ĉu vi edziĝis? "

"Ne, mi estas ankoraŭ fraŭlo".

"Kaj kiom da tempo vi restos ankoraŭ en tiu ĉi banloko? "

"Du semajnojn".

La etulo turnas sin al sia patrino kaj demandas: "Paŭjo kara, ĉu vi bezonas ankoraŭ pli da informoj? "



ESPERANTO EN RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F 75 Paris 16, Francujo. En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa Tempo oni aldonu unu horon. Aliajn horsistemojn vidu en la Jarlibro 1971, Dua Parto, p. 311. Mallongigoj: I = Informoj; P = Parolado; K = Kurso.

Ĉiutage

05.00-05.30 Warszawa, 200 m (1502 kcs), 50.04 m (5995 kcs), 48.90 m (6135 kcs), 41.18 m (7285 kcs). I. P. Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Poŝtokesto 46, Warszawa, Pollando.

15.30-16.00 Warszawa, 41.99 m (7145 kcs), 31.45 m (9540 kcs), 31.01 m (9675 kcs).

Dimanĉe

11.00-11.30 Pekino, 72.63 m (4130 kcs), 57.40 m (5220 kcs), 47.69 m (6290 kcs), 40.18 m (7470 kcs). I. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Ĉinujo.

11.30-12.00 Muritiba, 190 m (1580 kcs). I. K. Soc. Em. Radiovox, Muritiba (Bahia), Brazilo.

12.30-13.00 Pekino, 86.43 m (3500 kcs), 71.43 m (4200 kcs), 54.10 m (5545 kcs), 25.04 m (11980 kcs), 19.89 m (15080 kcs). I.

20.00-20.20 Roma, 41.24 m (7275 kcs), 30.90 m (9710 kcs), 25.42 m (11800 kcs). P. Radio Roma, Esperantofako, Casella postale 320, I-00100 Roma, Italujo

20.05-20.30 Sofia, 50.62 m (5920 kcs). P. Radio Sofia, Bulgarujo.

22.45-23.00 Valencia, 358 m (836 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.

23.30-23.55 Sofia, 49.42 m (6070 kcs), 31.38 m (9560 kcs). P.

Lunde

00.00-01.00 Sorocaba, 278 m (1080 kcs). I.K. Rádico Clube de Sorocaba, rua São Bento, Sorocaba (São Paulo), Brazilo.

12.20-12.30 Bern, 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 19.60 m (15305 kcs), 19.44 m (15430 kcs), 16.86 m (17795 kcs), 13.94 m (21520 kcs). P. (d-ro A. Baur), Svisa Radio, SOC, CH-3000 Bern 16, Svislando.

16.45-17.00 Tananarive, 235 m (1275 kcs), 88.02 m (3370 kcs). K. Radio Université, B.P. 909, Tananarive, Malagaŝa Respubliko.

Merkrede

12.20-12.30 Bern, kiel lunde (s-ro Gacond).

13.00-13.15 Wien, 203 m (1475 kcs). P. Radio Wien, Esperanto-elsendo, Argentinierstr. 30a, A 1041 Wien, Aŭstrujo. (Ĉiun kvaran sinsekvon merkredon.)

20.45-21.00 Sabadell, 203 m (1475 kcs). I.K. Radio EAJ 20, Sabadell, Hispanujo.

Ĵaŭde

20.00-20.15 Sabadell, 89.1 Mcs (mod. frekv.). Ripeto de la merkreda programo.

21.45-21.55 Bern, 75.28 m (3985 kcs), 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 25.60 m (11720 kcs), 25.28 m (11865 kcs), 19.60 m (15305 kcs), 19.44 m (15430 kcs). P. (d-ro Baur).

23.05-23.20 Zagreb, 264 m (1163 kcs). P. Radio

Zagreb, Jugoslavio.

Vendrede

18.30-19.00 Clermont-Ferrand, 90.4 Mcs (mod. frekv.). K. Centre de Télé-enseignement de la Faculté des Lettres, 29 bd. Gergovia, F-63 Clermont-Ferrand, Francujo.

20.00-20.30 Pekino, 58.20 m (5162 kcs), 47.84 m (6270 kcs), 47.61 m (6300 kcs), 45.38 m (6610 kcs), 44.00 m (6825 kcs), 31.98 m (9380 kcs). I.

21.40-22.00 Tallinn, 290 m (1034 kcs), 49.30 m (6085 kcs). I. Eesti Raadio, Esperanto, Poŝtokesto 402, Tallinn, Sovetunio. (Nur la antaŭlastan vendredon de ĉiu monato.)

23.40-23.50 Gdańsk, 1322 m (227 kcs), 278 m (1079 kcs), 230 m (1304 kcs). P. Pola Radio, Esperanto-fako, ul. Uphagena 1, Gdańsk-Wrzeszcz, Pollando. (Ĉiun alternan vendredon.)

Sabate

11.00-11.30 Pekino, kiel dimanĉe.

12.30-12.40 Gdańsk, 49 m, 48 m, 41 m, 31 m, 25 m kaj 66.29 Mcs (mod. frekv.). Ripeto de la vendreda programo.

12.30-13.00 Pekino, kiel dimanĉe.

20.00-20.30 Pekino, kiel vendrede.

21.45-21.55 Bern, kiel ĵaŭde (s-ro Gacond).

RADIO WARSZAWA krom la ĉi-supre anoncitan ĉiutagan programon prezentas "Anguleton por esperantistoj": 1) dum la germanlingvaj programoj dimanĉe de 16.30 h ĝis 17.00 h per ondoj 49 m, 41 m, kaj de 21.00 h ĝis 21.30 h per ondoj 49 m, 41 m, 31 m; 2) dum la svedlingva programo marde de 15.00 h ĝis 15.30 h per ondoj 200 m, 49 m; 3) dum la danlingva programo dimanĉe de 20.00 h ĝis 20.30 h per ondoj 49 m, 41 m. La anguletoj estas 4-minutaj, okazas ĉe la fino de la duonhora elsendo kaj pritraktas nur Esperanto-temojn.

ĜENERALA AŬDEBLECO

a) stacioj nur loke aŭdeblaj (nur en la lando mem, kelkaj nur en la urboj): Clermont-Ferrand, Gdańsk (M.F.), Muritiba, Sabadell, Sorocaba;

b) stacioj aŭdeblaj en Eŭropo kaj ĉirkaŭmediteraneaj landoj: Bern (75.28 m, 48.66 m, 31.46 m), Gdańsk (escepte de 66.29 Mcs), Pekino (vesperaj elsendoj vendrede kaj sabate), Roma, Sofia, Tallinn, Valencia (en suda Eŭropo), Warszawa, Wien (aŭdbla en centra Eŭropo), Zagreb;

c) stacio aŭdebla en Azio: Pekino (dimanĉe kaj sabate je 11.00 kaj 12.30 GMT);

ĉ) stacio aŭdebla en Afriko: Bern (25.60 m, 25.28 m, 19.60 m, 19.44 m, 16.86 m, 13.94 m).

Tio estas nur ĝenerala skizo, variigebla laŭ modelo de la ricevilo, atmosfera kondiĉo, lokaj cirkonstancoj diversspecaj.

OFICIALA INFORMILO

N-ro 458, 1 junio 1972

"KONTAKTO" KAJ "LMLP"

Kun bedaŭro ni avizas la abonantojn kaj aliajn ricevantojn de la junulara revuo "Kontakto" kaj de la revuo de CED "La Monda Lingvo-Problemo", ke ĉe ambaŭ revuoj ekestis grava malfruiĝo pro malfacilaĵoj ĉe la respektivaj redakcioj. Pro tio la unuaj numeroj de la jarkolektoj 1972 ne povos aperi antaŭ aŭgusto, plej frue. Oni tial bonvolu ne skribi al la administracioj pri nericevo.

PERANTO POR KOLOMBIO

Pro okupiteco rezignis sian oficon la Peranto de UEA por Kolombio, d-ro Miguel Pérez González. Nova Peranto estas s-ro Diego Hoyos Escobar (adreso: Avenida 42, n-ro 22-35, Bogotá 2).

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Eder, Josef, Gretlmühl, F. R. Germanujo.
Eliopulos, Kimon G., Nea Smirni, Grekujo.
Eliopulu, s-ino Anastasia K., Nea Smirni, Grekujo.
Takács, s-ino Elza, Csorna, Hungarujo.

NOVAJ MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1972

260 D. Pereira de Souza, Brazilo. 261 Roland Jossinet, Francujo. 262 Joseph Holtmann, F. R. Germanujo. 263 Phil. Ogwuazor, Pollando. 264 J. Lokna, Svedujo. 265 s-ino Berger-Kreth, Svislando. 266 Channing L. Bete Sr., 267 Gene Fellner, Usono.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al la art. 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj Delegitoj de UEA. Se ĝis la 15-a de septembro 1972 neniu membro protestos pro grava kaŭzo, la nomado fariĝos valida.

Argentino: Feldman Gonzalez, FD Firmat. **Brazilo:** Clóvis Valentim Tanhott, FD Bagé; Hugo Fóscolo, FD Pompéu. **Francujo:** Etienne Gaudry, FD Clamart. **Japanujo:** Waseda Yutaka, FD Nagoya. **Kanado:** Erna Sheppard, D Nanaimo. **Kubo:** René Valdés López, D La Habana. **Nederlando:** Piet Korte, FD Emmen. **Norvegujo:** Johs. H. Lund, FD Hamar. **Usono:** Reginald Jaderstrom, FD Honolulu; Betty Phelps, D Peru; Henry B. Milsted, D Zanesville.

NE PLU VALIDAS (en Jarlibro 1971)

— pro adresŝanĝoj kaj aliaj kaŭzoj

Aŭstralio: Canberra (FD teknika instruado, turismo), Launceston, Melbourne (D). **Brazilo:** Brasilia (D), Niterói, Rio de Janeiro (FD radio-amatorismo), Santos Dumont. **Britujo:** Chesterfield, Newcastle Craven Arms, Northampton (VD, FD religio, aŭtoservo). **Bulgarujo:** Trojan (FD turismo). **Ĉeĥoslovakujo:** Mladá Boleslav (FD aŭtoservo, turismo), Olomouc

(D), Tábor, Vojkov u Ríčan. **Danlando:** Haderslev. **Finnlando:** Imatra (VD), Puumala, Riihimäki, Teuva, Turku (FD flegado). **Francujo:** Dieppe, Lioux, Marseille (JD), Paris (FD fervojo), Saint Etienne (FD komerco, lingvoj), Wittenheim. **F. R. Germanujo:** Bad Wiessee, Elmshorn, Frankfurt (D), Gechingen, Lüneburg, Neumünster, Uelzen. **Grekujo:** Athina (JD). **Hindujo:** Lakhimpur-Kheri. **Hispanujo:** Calahorra, Ceuta, Las Palmas, Pontevedra, Valencia (FD skoltismo). **Hungarujo:** Komló. **Israelo:** Ramat Hajar. **Italujo:** Cagliari, Ghilarza (VD, FD filatelo), Milano (FD farmacio), Saccia, Torino (FD instruado). **Japanujo:** Tōkyō (FD belarto). **Jugoslavio:** Beograd (FD biblioteko), Gor. Logatec, Gradačac, Ljubljana (FD turismo), Lopud, Loznica, Sarajevo (D), Varaždin (turismo), Zadar (JD, FD filatelo, turismo), Zenica. **Kolombio:** Bogotá (D), Cartagena. **Kubo:** Camagüey. **Nederlando:** Den Haag (FD instruado), Groningen (FD paco), Sneek, Wageningen (FD), Zeist (FD). **Norvegujo:** Oslo (VD Ek). **Pollando:** Opole. **Usono:** Bay Shore.

DONACOJ 1972 (Gld.)

Fondaĵo Enciklopedio de Esperanto: F. R. Germanujo: Günther Becker, 225,39. Sumo ĝisnuna: 225,39. **Ĝenerala kaso:** F. R. Germanujo: G. Schmidt, 10,53. Nederlando: A. H. E. Goyvaerts, 10,—. Anonima, 1,48. Sumo ĝisnuna: 386,72.

Kampanjo "100 x 100": (por ke 100 personoj devigu sin donaci ĉiujare dum 3 jaroj ekde 1971 po 100 gld. aldone al la kutimaj kotizoj kaj donacoj).

56 Skania Distrikto de Sveda Esperanto-Federacio.

57 s-ino A. M. Slot, Nederlando.

Patronaj membroj A de TEJO: 19 C. Minnaja; 20 L. Minnaja, Italujo. 21 P. Zlatnar, Jugoslavio. 22 H. J. Lewis, Kanado. 23 R. Moerbeek, Nederlando. 24 R. Nordström; 25 O. Olsson, Svedujo.

Propaganda konto: Nederlanda Esperanto-Asocio "La Estonto Estas Nia", 575,—. Sumo ĝisnuna: 575,—.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo. Universala Esperanto-Asocio

|||||

KOREKTOJ

En n-ro 456 de la Oficiala Informilo s-ro P. Poly (Francujo) kaj ges-roj Eliopulos (Grekujo) aperis erare kiel membroj-subtenantoj 1972 anstataŭ dumvivaj membroj.

♦0♦

En la anonceto de la korea kuracisto, aperinta en la maja numero, estas preterlasita en lia nomo. Ĝi devas esti Yung Myung Kim anstataŭ Yung Kyung Kim.



TARIFO:

Ĉiu vorto kostas 0,45 gld. (t.e. 1 internacia respond-kupono). Pri la enhavo de la anonc(et)oj respondecas sole nur la anoncantoj.



Majo Issobe, 13-jara, loĝanta en Tyûô 6-14-3, Ota-ku, Tokio, Japanujo, kore salutas siajn geamikojn el la Esperanta Kongreso de Londono 1971, kaj sciigas al ili, ke ŝi partoprenos la Universalan Kongreson de Beograd 1973. Kiu tien ankaŭ venos, bonvolu antaŭe sciigi tion al mi per poŝtkarto. Antaŭdankante kun koraj salutoj, mi restas via Majo.

Memoru, ke s-ro P. Zacho, Åmosevej 5 A, DK-2700 Kopenhavn, daŭre akceptos ĉiaspecajn poŝtmarkojn por UEA. Ni petas vin konservi viajn uzitajn poŝtmarkojn kaj sendi ilin al la supra adreso. Tiel vi povas kontribui al financa fortikigo de UEA.

Radio-Bulteno n-ro 3 aperis. Informoj, praktikaj konsiloj pri utiligo de via radioricevilo por programoj en Esperanto ĉiutage, sugestoj por certigi daŭran programagadon en Esperanto el diverslandaj radiostacioj. Prezo, inkluzive membrecon, 6 int. rpk (5,20 Skr aŭ 1,00 US dol.). INTER — Societo por la internacia lingvo Esperanto en Radio, Box 55028, S-400 53 Gotenburgo 55, Svedio.

P.M. neuzitajn — p.k. kovertojn U.T. argentinajn ofertas, kontraŭ sendado de bildoj — kopiaĵoj de famaj pentraĵoj. Petu pliajn informojn: Luis Vicino C.C. 2272 CC, Buenos Aires, Argentino.

Fraŭlino, 25-jara akuŝistino, deziras korespondi kun samideanoj en la tuta mondo, diversaj temoj. Jordanka Janeva Nikolova, Neolit Bozveli 18, et. 1. Antovi, Kjustendil, Bulgarujo.

Universala Invalida Esperanto-Asocio, Box 5, Strib, DK 5500 Middelfart, Danlando, deziras kontakti ĉiujn invalidojn kaj kriplulojn de tuta mondo. Skribu por nia bulteno

Ni serĉas kontakton kun vere lerta prelegisto por serioj prelegoj en Esperanto antaŭ neesperantista publiko (ĉefe geinstruistoj kaj gelernantoj de gimnazioj, popolaj altlernejoj k.s.). Nur altkvalita, interesa kaj laŭeble aktuala temo (ne pri Esperanto) estos konsiderata. La prelegoj okazos sub aŭspicioj kaj en la nomo de Okcidentisveda Societo por Unuiĝintaj Nacioj. Petu detalajn informojn de la aranĝanto: INTER — Agadgrupo por Esperanto, Box 55028, S-400 53 Gotenburgo 55, Svedio.

Ĉu vi ricevis vian novan jarlibron de UEA? Se jes, vi certe ŝatus posedi la elegantan kaj praktikan kovrilon por via jarlibro. Mendu ĉe INTER — Agadgrupo por Esperanto, Box 55028, S-400 53 Gotenburgo 55, Svedio. Prezo: 3 int. respondkuponoj (2,60 Skr aŭ 0,50 US dol.). Sveda poŝtĉekkonto: 42 66 60 - 7.

Someraj Universitataj Kursoj 1972 pritraktos lingvistikon kaj medicinajn sciencojn. Informas: SUK-72, Boîte Postale 9, B-4000 Liège 3 (Belgujo).

Holzhaus, ricevinte novan materialon el Svedujo, Svisujo, preparas duan eldonon de broŝuro Trompeter, petas esperantistojn, havantajn leterojn de Trompeter, aŭ leterojn, enhavantajn informojn pri Trompeter, sendi kopiojn al Holzhaus, 2748 Orchard Lane, Columbus, Indiana, U.S.A., 47201. Leteroj kun nomoj de alsendintoj aperos en broŝuro.

Okaze de la 70-jara jubileo de sia unua Esperanto-kurso, Esperanto-Societo Balkana Stelo (poŝtokesto 90, Trojan, Bulgarujo) atendas esperantaĵojn por ekspozicio okazonta fine de aŭgusto. Ĉiu kontribuinto ricevos bildkarton.

Filatelistoj, kolektistoj. De la 24a Esperanto-Kongreso IFEF ankoraŭ haveblas: speciala kongreskoverto (2 int. rpk), kongreslibro (8 int. rpk), kongresinsigno (4 int. rpk), kongresdokumentujo (17 int. rpk). Kurt Greutert, Via Monte Ceneri, CH-6512 Giubiasco (Svislando).

Mi volas korespondi kun ĉino aŭ ĉinino. Mi estas 24-jara, interesiĝas pri arto kaj muziko. Frans Icke, Dr. J. Röntgenlaan 4, Bilthoven, Nederlando.

En kadro de filatela ekspozicio (1/10) kun temo "Ĝemeliĝoj de urboj" kaj "Eŭropo" ni prezentos panelojn. Por montri, kiel Esperanto taŭgas por pliproksimigi la popolojn, ni atendas bele afrankitajn bildkartojn el ĉiuj landoj. Respondo certa. Grupo "Bona Stelo", 31 rue Pêcherie, F-26100 Romans, Francujo.

Ĉiu aktiva esperantisto, kiu dezirus partopreni en interesa agado por plifortigi la reputacion de nia lingvo kaj movado, petu informojn pri la projekto "Aktiveco de la monato". Nur por seriozaj, konsciaj esperantistoj! Skribu al INTER — Agadgrupo por Esperanto, Box 55028, S-400 53 Gotenburgo 55, Svedio.

Deziras korespondi kun nederlandano tieslingve aŭ Esperante: 21-jara afrikanslingvano fraŭlo Cobus Zeelie, Laer Drostdystraat 29, Uitenhage, Sudafriko.

Kiu havas numerojn de la hispana revuo Popola fronto aperinta en 1936-39? Skribu al s-ro Ramon Molera, Sta. Joaquina 13, Moyá (Barcelona), Hispanujo.

14 gekursanoj de la televidokurso Esperanto deziras korespondi kun la tuta mondo. Ni organizos letervesperon la 28an de septembro. Certe respondos. Leterojn sendi al N. C. Kuiterman-van Goor, Multatulistraat 108, Groningen, Nederlando.

Skribu leteron aŭ pk al Radio de Svedio, Direkcio de Programo al la mondo, S-105 10 Stokholmo, Svedio, petante regulajn programojn en la internacia lingvo. Se vi jam pli frue skribis, estu afabla reskribi. En 1972 tri novaj, fortegaj sendiloj (po 500 kW) ekfunkcios kaj ebligos pli da programoj. Dependas de via senprokrasta ekskribo, ĉu Esperanto estos favorata. Ref.: INTER — Agadgrupo por Esperanto.



**"ĈIU ESPERANTISTO ĈIAM PORTU
LA ESPERANTAN INSIGNON (NE
MULTAJN, SED UNU)".**
— *Principaro de Frostavallen*

**Bikiniformatan eldonis UEA: diametro
8mm, pinglolo 43 mm; verda, filikeca
stelo sur blanka fono. Prezo: 1,62 gld.
(por Nederlando 1,85) + sendokostoj 10%.**

POR EVITI

la dornojn de la vivo, por ricevi ĝiajn fruktojn
kaj florojn, jen via gvidlibro:

"Monoteismo kaj pozitiva moralo"

Ĉe UEA: 4,20 gld. plus sendokostoj 10%.



ESPERANTO

GLUSTELO

Gluebla sur
aŭtomobiloj ktp.
Formato: 12 x 9 cm.
Prezo: nur 0,90 gld.

Mendu ĉe Libroservo de UEA

Ni kredu, ke venos tempo,

kiam la transpago estos ebla kaj ni rememoros
pri la Fondaĵo "Canuto" kiel unu nobla, hela
paĝo de la historio de la Esperanto-movado.

— membro en Bulgarujo

Dank' al la Fondaĵo Canuto mi ricevis la revuon.
Mi ne havas sufiĉajn vortojn por rakonti mian
ĝojon.

— membro en Indonezio

Via helpo estas granda por la Esperanto-movado
en Litovio, ankaŭ por miaj gekursanoj.

— membro en Soveta Unio


Mi estas ege dankema al la Fondaĵo Canuto la
eblecon membrigi kaj ricevi eldonaĵojn de UEA.

— membro en Egiptujo

Mi ne povas imagi mian vivon sen membreco de
UEA, revuo, jarlibro ktp.

— membro en Rumanujo

La Fondaĵo CANUTO estas speciala konto, en
kiun eniras mondonacoj kaj subvencioj, kaj el
kiu UEA pagas la membrokotizojn de meritaj
personoj en landoj, el kiuj ne estas eble libere
transpago al Nederlando. Donacojn por Fondaĵo
Canuto akceptas la Centra Oficejo kaj la landaj
kotizperantoj de UEA.



IDEALA KOMBINO

*En la Domo de UEA en Rotterdam troviĝas la biblio-
teko Hodler — unu el la 3 plej grandaj Esperanto-
bibliotekoj de la mondo, kun multaj raraj libroj,
periodaĵoj kaj manuskriptoj.*

*En tiu sama Domo de UEA troviĝas ekde aŭgusto
1972 unuaranga moderna fotokopia aŭtomato, la
plej nova kserografia modelo Rank-Xerox 4000. Sen-
fine konserveblaj, klaregaj kopioj sur ambaŭ flankoj
de ordinara papero! Granda rapideco: ĝis 45 kopiojn
en minuto!*

*Tiu ideala kombino signifas, ke de nun la tuta riĉaĵo
de la Biblioteko Hodler estas tuj disponebla al
kolektantoj, literaturamantoj, esperantologoj k.a. en
la tuta mondo.*

*Ĉu vi serĉas malnovan terminaron? praverkon el la
19a jarcento? la plej unuan numeron de Esperanto?
elĉerpitan poemaron? Zamenhof-manuskriptojn?*

Prezo de unu kopio (formato A4): 0,30 gld. Ekzem-
plo: kompleta kopio de 200-paĝa libro kostas nur
30,— gld. plus sendokostoj.

FOTOKOPIA SERVO DE UEA



Sendu poŝtkarton al Turku

Vi povas gajni belan pupon kaj aliajn premiojn!

Pro nia kutima aŭtuna festotago, La Tago de Turku
ni aranĝas nun konkurson por la tuta esperantistaro
en la mondo! Vi devas nur sendi poŝtkarton al la
adreso: **LA TAGO DE TURKU, Box 66, SF-20100
TURKU 10, Finnlando.** Inter la senditaj karto-
j oni lotumos dek belegajn pupojn. La karto-
j devas esti en Turku antaŭ la mezo de septembro — 15.9.1972.
Sendu vian karton tuj, jam hodiaŭ!

URBA TURISTA OFICEJO

Turku, Finnlando

**ĈU VI VOLAS ĜUI FELIĈAN, SANAN KAJ
HARMONIAN VIVON KAJ AKIRI SUKCESON EN
ĈIUJ VIAJ ENTREPRENOJ?**

Nia metodo de laŭsistema studado kaj praktiko de naturaj kaj metafizikaj leĝoj, eduko de la subkonscio kaj pozitiva pensado preparos la vojon al nova epoko de feliĉa homa vivo!

Korespondaj kursoj de usona kolegio "College of Divine Metaphysics" — fondita en 1918 — kun akiro de STATE APROBITA DIPLOMO EN PSIKOLOGIO, METAFIZIKO KAJ TEOLOGIO (sendogma) en angla aŭ germana lingvo. Ni planas Esperantan tradukon kaj serĉas libervolan tradukiston kaj kunlaborantojn en ĉiuj landoj! Petu senpagan katalogon (en angla aŭ germana). Aldonu 1 rpk. por aerpoŝta afranko! Skribu al la ĝen. Reprezentanto:

D-ro Tadros Megalli, delegito de UEA, D-8191 Munsing/Obb., FR Germanujo.

Kristalojn

Mineralojn

ĉiuspecajn el la tuta mondo mi deziras aĉeti daŭre. Aŭ rekte el minejoj aŭ tutaj kolektoj.

Skribu al: Harry Borchert (Mineraloj), D-3392 Clausthal-Zellerfeld, Adolf Römerstr. 17, F. R. Germanujo.

PARAPSIKOLOGIISTOJ

esperantistoj, kiuj ŝatas kolektiĝi idee,
estas petataj tuj skribi al s-ro

Prof-o Corrado Cerri-Calzoni

Casella postale 159, I-13051 Biella, Italujo

Fondita en 1966

LA LINGUA INTERNAZIONALE

Iama "L'Araldo Esperantista" (1926) **ESPERANTO**

Fondinto-Redaktoro: Corrado Cerri-Calzoni

Itallingva poresperanta gazeto.

Formato cm. 32 x 44. 4-paĝa. 5-kolona.
Papero flavkolora. Verda inko. Presita.
Ilustrita. Trimonata. Absolute neŭtrala.

Ne estas fiksita abonkotizo. Ĝi estas sendata al tiuj personoj itallingvoparolantaj, kiuj faras oferon (valoron de unu paketo da cigaredoj) kaj interesiĝas pri la internacilingva problemo.

SENPAGE ĝi aperigas korespondajn anoncetojn de esperantistoj tutmondaj, kiuj deziras ekrilati kun "ital(in)oj". KOMPENSU aldonante "uzitajn poŝtmarkojn", kies valoro (antaŭ nuligoj) sufiĉu por afranko de registrita letero al eksterlando.

Adreso: LA LINGUA INTERNAZIONALE esperanto
(Direttore: Corrado Cerri-Calzoni)
Casella Postale 159, I-13051 BIELLA (VC)
Pĉk: Corrado Cerri, Direktoro LI-espo, n. 5-742,
I-13051 Biella (VC).

**Ni provas trovi
skribantojn
de ĉie en la mondo
pri motorciklado**



Ni estas speciala gazeto pri motorciklado – MP-Sport. Ĉu vi konas la mondon de motorciklantoj? Grupojn, ilojn, renkontiĝojn, novaĵojn, kiuj apartenas al tiu mondo? Ĉu vi povas ankaŭ foti aŭ aranĝi la fotadon por viaj artikoloj? Vi devas ankaŭ koni kaj viziti la plej grandajn konkurojn proksimajn al vi. Ĉu interesas? Rakontu pri viaj eblecoj kaj ĝisnunaj agoj. Ni korespondas (plej volonte) en esperanto. Artikolojn ni akceptas en esperanto, angle, france, germane kaj svede. Skribu tuj. En respondo ni rakontos pri niaj salajroj kaj deziroj.

La gazeto

MP-sport

*reklamĉefo Harri J Melasniemi
Yliopistonk. 6 A
20110 TURKU 11 – Finnlando*